

LA ONDA de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto



2012

7

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2012. №7 (213)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Mojajev, Sergio Pokrovskij, Serge Sire, Andrzej Sochacki

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2012

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 590 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 27a paĝo de la februara *Ondo*.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 600 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2012.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2012, №7 (213).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 2 июля 2012 г.

Цена свободная. Тираж: 600 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Vortoj de komitatano Z

Survoje al la Fettes-erao

La strategia komisiono de UEA prezentis post preskaŭ du-jara naskado sian frukton, Strategian vizion por UEA. Ĝis nun ĝi apenaŭ vekis diskuton. Plej vigle devus diskuti pri ĝi la komitatanoj, ĉar la komisiono estis elektita de ili, kaj ili ankaŭ devos formale akcepti aŭ rifuzi la novan dokumenton. Kiel ĉiam, la komitatanoj tamen restas flegmaj kaj indiferecentaj. Nur kiam okazas mortoj aŭ jubileoj, la reta diskutlisto de la UEA-parlamento vekigas por kondolenci aŭ gratuli. Por la reputacio de la supera organo de UEA estus eĉ pli bone, se ĝia reta forumo ne estus publika, sed nur la komitatanoj mem rajtus legi ĝin kaj skribi en ĝi. Tio ne plaĉus al la kruckavaliroj de demokratio kiel Johan Derks kaj Ian Fantom, sed ni ne miru, se ĝuste la publikeco bridas iujn diri sian opinion, eĉ kiam oni tion petegas. Proforma demokratio malmulte valoras, se la kosto estas malefika funkciado de la Komitato kaj sekve de la tuta UEA. Oni devus en UEA havi la kuraĝon rezigni pri superflua demokratiaĵoj, des pli, ĉar iliaj plej laŭtaj postulantoj malhavas apogon de membroj. Ekzemple la menciita Derks estis la malplej voĉdonita kandidato en la lasta elektado de komitatano B kaj lia samideano Fantom fariĝis marĝenulo en sia landa asocio.

La indiferecenton de la komitatanoj pri la vizio dividas ankaŭ la ordinaraj membroj. Ankaŭ tio ne estas mirinda, ĉar la popolo ne legas programojn ĉiukaze. La entuziasmo ĉirkaŭ la Manifesto de Prago ne signifis, ke la miloj da subskribintoj legis ĝin. Parto certe legis, ĉar ĝia avantaĝo kompare kun la vizia dokumento estis ĝia mallongeco, nome unu paĝo anstataŭ dudek, sed por plej multaj la enhavo ne estis la kialo subskribi la Manifeston. Temis pri tio, ke meze de la 90-aj jaroj la prestiĝo de UEA estis kreskanta, ĉar ĝia tiama gvidantaro vekis fidon ĉe la membroj. Nur pri fido temas kaj ĝuste ĝi mankas, ĉar jam de pli ol dek jaroj la membroj ne prenas siajn ĉefajn gvidantojn serioze. Esperantistoj, kaj precipe la membroj de UEA kiel ilia elito, ne estas stultaj, eĉ se ili nenion diras, same kiel la babilemuloj ne estas saĝaj nur pro tio, ke ili ade parolas. En la ekstera mondo populistoj foje sukcesas mistifiki amasojn, sed en UEA la populismo de Renato Corsetti rikoltis neniun venkon, eĉ male. La lastan jardekon karakterizas daŭra malkresko de la membraro kaj proporcio eĉ pli granda forfuĝo de la abonantoj de la revuo, la ĉefa respegulanto de la populismo per siaj raportoj pri “pozitivaĵoj” kaj grupaj fotoj el Esperanto-renkontiĝoj.

La komunaĵo de la nova vizio kaj la Manifesto de Prago estas ilia ĉefa aŭtoro Mark Fettes. Siatempe li estis unu el la fidovekantoj kaj lia blazono ankaŭ poste ne makuliĝis, ĉar li restis flanke dum la Corsetti-erao. Lian popularecon konfirmis ankaŭ lia unua loko en la elektado de komitatanoj B antaŭ du jaroj. Plej saĝe estas jam nun konsenti pri lia elekto kiel la sekva prezidanto de UEA kaj survoje al Rejkjaviko lasi al li la eblecon kunmeti sian estraron.

Komitatano Z

Sur la kovropaĝo estas foto el Tecamac (Meksiko), kie la 9an de junio okazis la plej amasa ekzameno kadre de la tutmonda KER-sesio kun entute 39 kandidatoj. Post la ekzameno oni fermis kaj kopiis la dokumentojn en ĉesto de la ekstermovada kontrolisto (*Fotis José Cruz Pacheco*).

KER: Eksterordinara ekzamentago por 356 kandidatoj

La 9an de junio 2012 sukcese okazis la Tutmonda KER-ekzamenseso, kadre de kiu en 29 lokoj de 17 landoj ekzameniĝis 356 personoj. *La Ondo* pridemandis d-rinon Katalin Kováts, la iniciatinton kaj organizanton de ĉi tiu evento.

Ĉu ĉio finiĝis bone, ĉu vi kontentas?

La preparo kaj la ekzamentago finiĝis, sed la laboro daŭras. Nun okazas kontrolado de la testoj en Budapeŝto, venos la kalkulo kaj publikigo de la rezultoj kaj poste la produktado kaj sendado de la atestiloj. Krome dankleteroj, raportoj, analizoj kaj artikoloj, intervjuoj... do, amaso da laboroj ankoraŭ.

Kiom da personoj laboris por tiu tutmonda kampanjo?

Tio dependis de la programfazo. Ekde la naskiĝo de la ideo, la okazigo de la kampanjo, informado, trovo kaj trejnado de sesdeko da surlokaj helpantoj, aligo de kandidatoj, preparo de la testoj, presado, alpoŝtigo de la testoj, reĝisorado kaj raportado dum la ekzamentago, ĉio ĉi okazis en kaj el mia hejmo. Gravis ankaŭ ellabori la tutan proceduron kun ties dokumentado kaj krei la infrastrukturon, ja ĉio estis nova. Dum la tago mem helpis 60 lokaj personoj, kaj en la posta fazo en Budapeŝto laboras 3-4 pliaj personoj, kun kiuj mi havas daŭran kontakton.

Kiucele vi organizis tiun tutmondan kaj kial nur skriban sesion?

Mi volis kontentigi tiujn, kiuj ne povas vojaĝi al grandaj eventoj. Eĉ se ne la kompleksan version, ili tamen havu la eblon almenaŭ je la skriba parto, por kiu ne necesis delegi du akreditigitajn ekzamenantojn. Aliflanke la skriba parto pli facilas, do, en tiu sukceso povas vekti plian apetiton. En Ruslando kaj Meksiko ja okazis tiel, tie jarfine estos la parolaj sesioj.

Ĉio pli facilos kiam ni sukcesos atingi, ke la Budapeŝta centro volu kaj poste sukcesu oficiale modifi la regulojn cele al apliko de parte virtuala ekzameno. Longa burokratia vojo... sed espereble irebla.

Ĉu vi dekomence certis pri centoj da kandidatoj?

Ne, mi eĉ ne revis pri tio. Unue mi pensis pri ĉ. 50–60, poste pensante pri la jubileo iel mi strebis atingi 125. Sed 356 estas super ĉiuj imagoj.

La ĉiam kreskanta kvanto ja komplikis vian laboron.

Ne la kvanto de la kandidatoj, sed la kvanto de la lokoj. Trovi kaj trejni por ĉiu loko almenaŭ du personojn, kontroli la ejojn kaj lokajn cirkonstancojn, tio prenis energion. Estas du lokoj, kun kies gvidantoj mi interŝanĝis pli ol po cent mesaĝojn. Fine tamen en ĉiu loko oni faris ĉion eblan por sekvi la preskribitajn instrukciojn. Post plurmonata prepariĝo agrablus la festo je mondskala dimensio kaj oni fieris pri sia partopreno.

Fieris antaŭ kiu?

Certe ene de la movado, kompreneble, sed kio eĉ pli gravas: tiu evento estis “tre serioza afero”, pri kiu eblis informadi ekstermovade. Ni klopodis trovi patronojn, involvi lokajn funkciulojn por doni pli da prestiĝo al la evento. Vicurbestro, lernejestroj, universitataj profesoroj, direktoro de biblioteko, ĵurnalisto ricevis kaj portis la sigelitajn kovertojn kun la testoj al la ekzamenlokoj. Aperis pluraj gazetartikoloj, televidaj novaĵoj kaj intervjuo, ĉie kun pozitivaj eĥoj. Oni menciis la 125-jaran jubileon de la lingvo kaj komparis nian ekzamenon al seriozaj, oficialaj abiturientaj ekzamenoj. Tiaj agnoskoj multe gravas kaj por la movado kaj por la lokuloj. Jam por tio valorus ripeti la kampanjon.

Ĉu vi planas fari el tio tradicion?

Origine temis pri unufoja okazo, aŭ almenaŭ provo. La faritaj enketoj indikas, ke pluraj lokoj volas refari la ekzamenon,

kaj jam aperis novaj urboj sur la estinta ekzamenmapo. Do, verŝajne ni devos cedi al la petoj, des pli, ĉar multaj aferoj jam pretas, eble necesos ŝanĝi nur kelkajn aferojn en la proceduro.

Kiuj estis la plej multkandidataj ekzamenlokoj?

La plej grandaj estis vilaĝo en la regiono de Tecamac en Meksiko kun 39 kandidatoj kaj Moskvo kun 30. Al ambaŭ lokoj vojaĝis kandidatoj eĉ de 400-kilometra distanco. Tute male, francoj diaspore okazigis sesiojn, en naŭ urboj de la lando. Cetere ili havis sume la plej multajn, 118 kandidatojn.

Sed ni ne subtakso lokojn kun malmultaj ekzamenitoj. Estis kortuŝe, ke en unu loko kvar personoj subiĝis nur por ke unu movhandikapa kandidato povu surloke trapasi la delonge deziratan ekzamenon.

Se temas pri nombroj, kiom da personoj ĝis nun trapasis la novtipajn ekzamenojn de UEA-ITK?

Dum kvar jaroj ekzameniĝis entute 925, kaj ĉ. 900 sukcesis. Precizan statistikon mi pretigos aŭtune, post la lastaj tri someraj sesioj, kiuj okazos en Hanojo, dum SES en Slovakio kaj en Sicilio dum la Itala kongreso.

Ĉu gravas atingi iun nombron, ekzemple la magian mil?

Nu, materie mi neniel estas interesata en tio. Tamen por la altiĝo de la kvalito de la esperantistaro estus bone, se la ekzamenatestilo fariĝus parto de la Esperanto-identeco. Aliflanke por la baldaŭa kvalitekontrolo — fare de la britia Asocio de Lingvo-Testistoj (ALTE) — necesis atingi difinitan kvanton de ekzamenokazoj. Tio jam estas plenumita, sekve restas nur aliaj kelkcent punktoj, kie nia laboro devos konformi al la reguloj. Ni esperas, ke ankaŭ la sistemo mem sukcese trapasos la kvalitekzamenon.

Kiuj momentoj estis la plej malfacilaj?

La lastaj noktoj. Mi ne povis dormi pro la timo, ke eble mi miskalkulis, kaj estos kovertoj kun malĝusta kvanto de testoj.

Kaj ĉu estis?

Bedaŭrinde jes, sed Zamĉjo helpis min. La eraro okazis en loko, kie eblis ĝin tuj nerimarkate solvi. Mi estis savita.

Kaj la plej ĝojigaj momentoj?

Estis pluraj. Je la 9a matene, kiam en la sama momento en 24 lokoj oni malfermis la kovertojn, mi staris sola ĉe mia komputilo. Estis bona sento, sed tre solecaj minutoj ĝis la unuaj telefonaj konfirmoj, mesaĝoj kaj fotoj, kiuj ligis min al ĉiu loko aparte. Sed estas korvarmigaj ankaŭ la ricevitaj poŝtkartoj kun la bildoj de la urboj kaj centoj da subskriboj de la kandidatoj. Tiujn mi nepre konservos kiel perlojn pri la evento.

Katalin akceptas postekzamenajn raportojn de lokaj responsuloj.



En 2014 Bonaero! Sed poste?..

Ĉi-jare la 97a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Hanojo (Vjetnamio), post unu jaro la 98an UKon gastigos Rejkjaviko (Islando). La Estraro de UEA decidis, ke la 99a UK en la jaro 2014 okazos en Bonaero, la ĉefurbo de Argentino.

“Argentino gastigos UK-on por la unua fojo, sed Esperanto havas tie jam longan tradicion. La lingvo estis enkondukita en la landon en 1889 fare de la pola rifuĝinto Polasky. La landa asocio de UEA, Argentina Esperanto-Ligo, estis fondita en 1941. Ĉar unu el ĝiaj kunfondintoj estis Tibor Sekelj, estas bela koincido, ke la elekto de Argentino okazis ĝuste en la jubilea jaro de la 100a datreveno de lia naskiĝo”, — klarigis la 8an de junio speciala Gazetara Komunikado de UEA.

Kurioze, la elekto de kongreslando lastatempe mirinde koincidas kun la venkolando en la futbala mondpokalo de FIFA, okazanta ĉiun kvaran jaron. Vidu mem: en 1998 UK okazis en Francio, kaj Francio gajnis la mondpokalon. En 2002 la esperantistoj kongresis en la Brazilo urbo Fortalezko, kaj tiujare Brazilo perbatialis la mondpokalon en Japanio kaj Koreio. En 2006 UKon akceptis la bela itala urbo Florenco, kaj la piedpilkistaro de Italio sukcesis gajni la mondpokalon en Germanio. Nu, kvar jarojn poste, en 2010, tiu regulo ne validis, ĉar la kongreslando Kubo ne partoprenis tiujaran mondpokalon en Sud-Afriko, kiun gajnis Hispanio — la eksmetropolo de Kubo. Sed danke al UEA la Argentinaj futbal-majstroj post du jaroj havos bonegan ŝancon iĝi mondĉampiono en sia najbara-rivala lando Brazilo...

Dume ne estas decidite, kie okazos la jubilea 100a UK, sed oni scias, ke la Unuiĝo Franca por Esperanto jam anoncis, ke ĝi kandidatas por akcepti ĝin en 2015 en norda Francio, en la regiona ĉefurbo Lille (Lillo) kun tuta tago en Bulonjo-ĉe-Mar, kie en 1905 okazis la plej unua UK.

AIKo



RIO+20
Conferência das Nações Unidas sobre Desenvolvimento Sustentável

Esperanto en Rio+20

(GK UEA). Rio-de-Ĵaneiro gastigis 13–22 jun la Konferencon de UN pri Daŭripova Evoluo, Rio+20. La nomo Rio+20 referencas al la unua tia konferenco en Rio-de-Ĵaneiro en 1992.

Ŝtatestroj kaj aliaj politikistoj el 193 membroŝtatoj de UN kaj reprezentantoj de la civila socio kunvenas en la kongresejo Riocentro. Samtempe okazas Kupolo de la Popoloj kun miloj da NRO-representantoj. Ankaŭ teamo de dudeko da esperantistoj realigas diversajn aktivaĵojn.

La jam fama temo de UN *La estonteco kiun ni deziras* inspiris la mondan komunumon prezenti siajn sugestojn. La nia estas *La lingvo kiun ni deziras*. Aktivaj gejunuloj portas helverdan ĉemizon, kiu proklamas fronte en la angla *Esperanto — the language we want* kaj dorse en Esperanto *Ni volas tiun lingvon* kun la adreso de la retejo www.lernu.net.

Miloj da NROj prezentis proponojn por prelegi pri neimagebla kvanto da temoj. UEA, TEJO kaj la vegetarana asocio TEVA sukcesis fari tri prezentojn (po 30 minutoj) pri la temo *Daŭripovaj konkretaj proponoj por nova estonteco*. Prelegis d-ro Francisco Wechsler, la ĵurnalistino Renata Ventura kaj Ursula Grattapaglia.

Ĉiuj ses reprezentantoj de UEA, akredititaj ĉe UN, frekventis prelegojn, ĉe kiuj oni ofte debatas en pluraj lingvoj, kaj la lingva problemo estas evidenta. Paralele en la Kupolo grupo da junuloj prelegas en tendoj, dialogas kun centoj da interesatoj pri daŭripova lingvo kaj lingvaj rajtoj kaj intervenas en debatoj.

Alvaro Motta kaj Rafael Zerbetto partoprenis la junularan konferencon Youth BLAST, kie ili havis okazojn por reliefigi la lingvan situacion kaj la proponon de UEA. Entute 200 gejunuloj el la tuta mondo sendis duminutan videon pri la temo *La estonteco kiun ni deziras*. Inter la gajnintoj, po tri el ĉiu kontinento, Rafael Zerbetto estas unu el la tri amerikanoj. Li estis plurfoje invitita prezenti sin antaŭ gravuloj. En sia filmo li parolas en Esperanto pri la naturkatastrofo en Amazonio kun anglaj subtekstoj.

Ursula Grattapaglia

EU rifuzas himnon en Esperanto

Komence de aprilo Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) sendis al la ĉefa gvidorgano de EU, la Eŭropa Komisiono, proponon, laŭ kiu EU rekomendu la kantadon de la eŭropa himno en Esperanto. La celo de la iniciato laŭ EEU estis fortigi la komunan eŭropan identecon, grandigi la partoprenon de la civitanoj en la eŭropa integriĝo, donante al ili la eblon kanti kune, kaj certigi la respekton por ĉiuj eŭropaj lingvoj.

La 1an de junio 2012 la Eŭropa Komisiono oficiale rifuzis la proponon de EEU. Laŭ la Eŭropa Komisiono, la propono kolekti subskribojn subtene al himno en Esperanto ne estas akceptebla, ĉar neniu EU-lando agnoskas Esperanton kiel parton de sia kultura heredaĵo.

“EEU nun konsideras multajn eblajn reagojn, kaj evitos iun ajn hastan decidon. Ni restos prudentaj”, — komentis la prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio, Seán Ó Riain.

Laŭ Libera Folio

Varsovio: Veturu per “Veturilo”

La sistemo de urbaj bicikloj en Varsovio nomiĝos *Veturilo*. La decido pri tio estis akceptita per interreta voĉdonado, organizita de la Estraro de Publika Transportado en la ĉefurbo de Pollando.

Danke al la voĉdonemo de esperantistoj, la nomo en Esperanto ricevis 32 procentojn de voĉoj. Sekvis ĝin *Wawa-bike* kun 26%, kaj la trian lokon okupis *Ziuiu* kun 12%. Postrestis *Rowerynka* (12%), *Bajker* (11%) kaj *Wabik* (6%).

Post funkciigo de 125 luo-stacioj kun 2100 bicikloj la Varsovia sistemo estos la plej granda en la Orienta Eŭropo. Ĝia uzado estos tre simpla — necesos registriĝo kaj antaŭpago. La prezoj por la biciklado ne estos altaj kaj favoros mallongajn vojaĝojn: 20-minuta luo estos senpaga, sekvaj 40 minutoj kostos nur unu zloton. Por la dua kaj tria horo necesos pagi respektive 3 kaj 5 zlotojn. Ĉiu plia horo kostos 7 zlotojn.

Laŭ <http://pej.pl>



La svedoj kongresis

Ĉirkaŭ 50 kongresemluloj, inkluzive de gastoj el Finnlando kaj Danlando, venis al Helsingborgo, en la suda Svedio, por partopreni la ĉi-jaran svedan esperantokongreson meze de majo.

La kongresejo, la bela kaj kulturprotektata ABF-domo, estas en la urbo centre lokita. Multaj preterpasantoj povis vidi la Esperanto-flagon kaj du trikitajn koltukojn Esperanto-kolorajn, kiuj pendis ĉe la strata enirejo.

La kutimaj kongresaj kunvenoj komenciĝis sabate, sed pluraj kongresanoj partoprenis jam la vendredan ekskurson aŭ promenon tra la urbo, uzante la gvidilon en Esperanto. La ekskurso finiĝis ĉe la tombo de nia pioniro Backman, kie la grupo honoris lin per parolo de nia prezidanto kaj flornamaĵo.

Vespere oni ĝuis la vespermanĝon surŝipe inter Svedio kaj Danlando.

Komunuma reprezentanto bonvenigis la kongreson kaj iom rakontis pri la kongresejo. Reprezentantino de la Sveda Pac-asocio ankaŭ salutparolis kaj je nia granda ĝojo, al SEF ŝi transdonis parton de lingva premio de Josefina Larsson, kiun administras tiu asocio.

La sabataj prelegoj temis pri la nova gimnazia temo “människans språk” (homaj lingvoj). Prelegis unue Folke Wedlin, kiu instruas en Lerum, kaj due prelegis kune kaj dulingve Olof Pettersson kaj Hokan Lundberg, kiuj instruas en Cybergymnasiet en Stokholmo.

Posttagmeze okazis la jarkunveno de SEF. Roland Lindblom estis reelektita kiel prezidanto. Hokan Lundberg estas nova anstataŭanto en la estraro.

La supeo sabatvespere estis kaj belaspekta kaj bongusta. La deserton la preparantoj eĉ plibeligis per verda stelito el marcipano. Poste multaj muzikistoj amuzis la partoprenantojn.

Dimanĉe, post la jarkunveno de la sveda sekcio de KELI kaj la diservo en Gustaf Adolfs-preĝejo, prelegis Hokan Lundberg pri multlingva familio kaj pri la projekto Esperanto-info.

Bengt Olof Åradsson

La Kongresa koncerto (Olof Pettersson)



IFK-64: Bonega publika rezulto

La 64a Internacia Fervoja Kongreso (IFK), okazinta 19–25 maj 2012 en la Esperanto-urbo Herzberg am Harz, laŭ la opinio de pluraj famaj kaj aktivaj esperantistoj estis la plej sukcesa fervojista kongreso dum la lastaj jardekoj.

Partoprenis 160 aliĝintoj el 21 landoj, sed kun multaj okazaj vizitantoj la nombro superis 200. La solena inaŭguro okazis dimanĉe, la 20an de majo, en plena lerneja aŭlo, kie la prezidantino de IFEF (Internacia Fervoja Esperanto-Federacio) Rodica Todor el Rumanio malfermis la kongreson. Post la festparolo de la prezidanto de GEFA Achim Meinel, salutoj de landaj delegitoj, transdono de honordiplomoj, oni aŭskultis belan kantadon de fervojista koruso el Hanovro.

En la malfermo parolis ankaŭ Margarete Zavoral, la ĉefino de la germana sekcio de fervoja socialorganizaĵo BSW, kaj la urbestro Gerhard Walter, kiu en flua Esperanto bonvenigis la kongresanojn venintajn el kvar kontinentoj.

La komunan fotadon sekvis nekutima evento — parado de kongresanoj en fervojistaj uniformoj kaj kun flagoj de la reprezentitaj landoj tra la urbo al la urbodomo. Loka tamburista orkestro gvidis la multkoloran procesion, en kiu kunmarŝis ankaŭ la fervojista koruso el Hanovro en siaj elegantaj uniformoj.

Posttagmeze ĉe la stacidomo, en ĉeesto de centoj da homoj el la urbo kaj regiono, estis inaŭgurita la Esperanto-placo kaj Joachim-Gießner-Vojo. La eksa stacidomestro Joachim Gießner — unu el la plej multflankaj talentuloj en la tuta

Esperanto-movado — loĝis en Herzberg kaj dum ĉ. 30 jaroj estis prezidanto de IFEF. Ĉe la nova Esperanto-placo ludis la fama blovorkestro Sieber. La estrino de la stacidoma kiosko kreis la novan trinkaĵon “Esperanto-bovĵajo”.

Lunde la oficialan urban akcepton plenumis vicurbestro Ulrich Schramke en la kavala salono de la Welf-kastelo. Poste oni povis rigardi la ekspozicion pri fervojoj kaj Esperanto en la Esperanto-ĉambro de la muzeo. En la sekvaj tagoj okazis fakprelegoj pri fervojaj temoj, fakkunsidoj, seminario de ILEI, kiu la unuan fojon aranĝis ĝin en IFEF-kongreso. Rodica Todor kaj Stefan MacGill en Herzberg subskribis dokumenton pri estonta kunlaboro inter la du fakaj asocioj de UEA.

La varia programo enhavis ekskursojn al la Unukornula Groto en Scharzfeld, al la universitata urbo Göttingen, kaj al la historia Harz-urbo Goslar. La tuttaga ekskurso ofertis veturadon per la fama etŝpura trajno tra la Harz-montaro al Wernigerode. En la riĉa kultura programo enestis filmprezentado en Esperanto pri la 175-jariĝo de la germanaj fervojoj, balo kun la dancmuzikgrupo *Argĝentaj Birdoj*, kiuj kantis ankaŭ en Esperanto; bonega vespero kun la Esperanto-kantistoj Ralph Glomp el Hamburgo kaj Manŭel el Italio.

La loka organizanto de la kongreso, Interkultura Centro Herzberg, zorgis pri vasta reklamo: en la urbo ĉie pendis grandaj afiŝoj pri la kongreso, kaj entute regis bonega etoso kun la unika atmosfero de la ununura oficiala Esperanto-urbo de la mondo.

Peter Zilvar, Zsófia Kóródy



Kroatio: La deka kongreso

La dekan fojon kongresis la kroata esperantistaro en sia jubilea kongreso en Koprivnica la 22an–24an de junio ĉi-jare. Aliĝis preskaŭ 180 geesperantistoj el Kroatio kaj 14 aliaj landoj de kvar kontinentoj, el kiuj alvenis ĉirkaŭ 140 kongresanoj.

La unuan kongresan tagon oni rezervis grandparte por la jarkunveno de Kroata Esperanto-Ligo (KEL) kiu daŭris pli ol ses horojn (duoble pli ol planite). Pro tio dum la unua kongresa tago malfruis aŭ entute ne okazis la aliaj planitaj programoj. El pluraj planitaj prelegoj okazis nur la prelego de Zlatko Tišljar *La vivfilozofio de Tibor Sekelj* kaj la publika prezento de la libro *Sonĝoj kaj ombroj* de Zdravko Seleš. Pro la sama kaŭzo malfruegis ankaŭ la koncerto de la itala kantisto Manŭel kaj prokrastiĝis la amika vespero de malnovaj brigadanoj-esperantistoj.

La organizantoj esprimis sian grandan bedaŭron pro tia evoluo de la programo, ĉar ĉio estis zorge planita, sed pro la internaj problemoj de KEL diskutitaj en la jarkunveno, la planoj fiaskis. Dum posttagmezaj horoj, por ĉiuj kongresanoj estis organizita vizito al Muzeo de nutrado.

Tamen, la dua kongresa tago estis brila. La programo komenciĝis kaj finiĝis maksimume akurate. El la politikaj funkciuloj partoprenis kaj salutis la kongreson la anstataŭanto de la departementestro Ivan Pal kaj la konsilistino de la urbestro Helena Hećimović, kiuj tre favore parolis pri Esperanto. En la kultura programo partoprenis la Kulturarta societo “Koprivnica” per la kroata kaj Esperanta himnoj, per la kanto “Koprivnica” (la urba himno) kaj per du koreografioj de la regiona folkloro.

“Kaposvár salutas Koprivnicon” estis interesa maniero kunligi per

Esperanto la ĝemelajn urbojn Kaposvár (Hungario) kaj Koprivnica (Kroatio). Per la iniciato de esperantistoj, el Kaposvár venis speciala Esperanto-sendito de la urbestro Károly Szita. Li estis la kapošvara esperantisto Béla Apáti Kóvacs, kiu alportis specialan saluletaron al la urbestro de Koprivnica, Vesna željeznjak.

En la daŭro de la programo estis omaĝita la forpasinta kroata aktorino Vida Jerman, al kiu pasintjare estis atribuita la premio “Kalendulo” establita de la kroata esperantisto Neven Kovačić. Riĉigis la programon per sia kabaredaĵo *Posttagmezo kun Saša* la konata Esperanto-artisto Saša Pilipović, kaj longan koncerton prezentis la operkantisto Neven Mrzlečki el Zagrebo. Aparte estis omaĝita la Esperanta poeto Đuro Rašan okaze de lia centa naskiĝdatreveno. La kultura programo finiĝis per kantado de Eŭropa himno (prezentita de Neven Mrzlečki), ĉar Kroatio troviĝas ĉe la sojlo de la plenrajta membreco en la komunumo de eŭropaj ŝtatoj (tiun statuson ĝi akiris komence de julio 2013).

La Organiza komitato de la kongreso regalis ĉiujn kongresanojn per komuna tagmanĝo en la Hotelo “Podravina”, post kio venis busoj kiuj transportis ilin al senpaga sed riĉa kongresa ekskurso.

La unua ekskursiva celo estis la vilaĝo Koprivnički Bregi, kie estis inaŭgurita nova ZEO: memortabulo al Ilija Puhalo (1899–1937) okaze de la 75a datreveno de lia morto.



Li estis unu el la ĉefaj figuroj de la fervojista Esperanto-movado kaj la persono kiu pleje elstaris en la disvastigo de Esperanto en la nordkroataj regionoj. La memortabulon kune malkovris la estro de la Komunuma konsilio Darko Sobota nome de la komunumo Koprivnički Bregi kaj Josip Pleadin nome de Dokumenta Esperanto-Centro, kiu iniciatis la starigon de la tabulo.

Post tio la kongresanoj vizitis la vilaĝon Hlebine, la lulilon de la kroata naiva (pentro)arto. La lasta celo de la ekskurso estis la urbeto Đurđevac, kie tiutage okazadis la fina festo de la turisma kaj kultura manifestacio “Pikokijada”. La kongresanoj spektis nekutiman teatraĵon en la ekstera scenejo, kiu okazis nokte kun multaj aktoroj, statistoj, rajdantoj kaj sonaj kaj lumaj efekttoj. Post la teatraĵo, je la noktomezo, estis spektita ankaŭ la impona piroteknika spektaklo.

Por la tria kongresa tago estis preparita malstreĉiĝo en la urbaj naĝbasenoj kaj aparte riĉa pikniko en la vinberejo de Josip Kolarević apud Đurđevac.

El specialaj kongresaj programoj menciindas, ke en la montrofenestroj de la biblioteko kaj legejo Fran Galović en Koprivnica estis prezentita ekspozicio rilate al la 125-a datreveno de Esperanto. Kunlabore kun Filatelista societo de Koprivnica estis lanĉita filatela koverto, kaj la Kroata poŝto la 23an de junio uzis specialan poŝtan stampon en sia oficejo en Koprivnica.

La kongreson oficiale aŭspiciis la departemento Koprivnica-Križevci kaj la Urbo Koprivnica, sed sian financan kaj alian helpon donis pluraj sponsoroj. La organizanto de la kongreso estis Dokumenta Esperanto-Centro el Đurđevac, komisiita de KEL. La Organiza komitato konsistis el naŭ aktivuloj kiuj la tutan laboron plenumis sub la lerta gvidado de sia sekretario Josip Pleadin.

Dokumenta Esperanto-Centro eluzis la kongresan partoprenon de la brazila geedza paro Gilberto kaj Aparecida Menegasso por organizi la postkongresajn prelegojn “Brazilo — koninda lando”, kiuj okazis la 26-an de junio en Bjelovar kaj la 27-an de junio en Sisak kaj Petrinja.

Menciindas, ke la geedzojn Menegasso en oficiala vizito akceptis ankaŭ la urbestro de Bjelovar, kaj la iniciaton salutis per sia letero la ambasadoro de Brazilo en Kroatio, Luiz Fernando G. de Athayde.

Davor Grgat

Trilanda kongreso en Berlino

De la 25a ĝis 28a de majo ĉirkaŭ Pentekosto, kiun sekvas en Germanujo ŝtata feritago lunde, okazis en Berlino la Komuna Esperanto-Kongreso de la dana, germana kaj pola Esperanto-asocioj, al kiu venis entute 255 partoprenantoj el 18 landoj. La kongreso estis samtempe la 89a Germana Esperanto-Kongreso, kiu same kiel kelkaj antaŭaj okazis kunlabore kun la najbara landa asocio por igi la kongreson pli interesa, allogi pli da partoprenantoj kaj pligrandigi la eblecojn praktiki Esperanton. Trafe la temo de la kongreso do estis “Partneroj en Eŭropo”, kiun la partoprenantoj prilumis aŭskultante prelegojn, en organizita debato kaj praktike dum la daŭro de la kongreso.

Vendredovespere la iama prezidanto de la Germana Esperanto-Junularo, nuna estro de la Germana Esperanto-Instituto, kaj ekster Esperantujo en Germanujo konata ĉefe pro sia aktiveco en la piratpartio, profesoro pri lingviko Martin Haase prezentis idealojn kaj realojn de la Eŭropa Unio kaj ties demokratio, samtempe montrante eblecojn plibonigi ĝin per la koncepto de likva demokratio.

Likva demokratio estas maniero de grupa decido, kiu kunigas ecojn de rekta demokratio kaj de reprezenta demokratio. Ĉiu grupano (aŭ civitano) povas aŭ mem voĉdoni pri iu propono aŭ transdoni sian voĉon al alia. Tiu transdono povas limiĝi je certaj decidoj, temoj aŭ esti tute ĝenerala. La transdono estas dumtempa kaj la transdoninto povas fini ĝin dum ajna momento, ekzemple mem voĉdonante. Por tiu sistemo indas uzi komputilprogramon kiel *Liquid Feedback*, populara en la germana piratpartio.

Post tiu klera komenco, kongresanoj kantis gvide de Kim kaj koruso el la pola urbo Nowy Sącz la Eŭropan himnon laŭ versio de Broccatelli. Pliaj temrilataj programeroj estis prezento kaj diskuto de eblaj roloj de Esperanto en Eŭropa Unio de la lingvisto Detlev Blanke kaj la prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio Seán Ó Riain, podia diskuto pri ĝemelurbaj rilatoj kaj prezento de Eŭropuniaj projektoj utiligantaj Esperanton.

En la vespera programo ravis la partoprenantaron ĉiuvespere la pola koruso, kiu en varia konsistigo kantis polajn kaj Esperantajn kantojn kaj prezentis teatraĵeton. Elstara programero estis la *Historio de Universalaj Kongresoj* — teatraĵo de Saša Filipoviĉ kaj Georgo Handzlik, kiu ironie prilumis la gloran pasintecon kaj mokis kongresajn kutimojn. En



Berlino: Ensemblo el Nowy Sącz (Fotis Andrzej Sochacki)

trilanda vespero kantis tri bardoj el tri landoj diversstile: Kim el Danujo, Stefo el Germanujo kaj Georgo Handzlik el Pollando. Ĉiu siamaniere interesis la publikon, kiu en granda aŭlo kun bonega sceneja tekniko povis sekvi la spektaklon.

La tagan programon gastigis novkonstruita kvartala renkontiĝejo, kiu provizis bonegan lokon por babili, manĝi, kaj partopreni la programerojn.

Interesega granda urbo kaj varma somera vetero estis du malamikoj de la kongreso, kiuj motivigis konsiderindan kvanton da partoprenantoj ne ĉeesti kelkajn programerojn kaj memstare esplori la urbon. Tio eblis ankaŭ dum la ekskur-

sa tago, en kiu la organizantoj proponis vojojn ekkoni la urbon per kaj transe de la kutimaj turistaj itineroj. Surprize multaj aliĝis al ekskurso en la proksiman Spree-arbaron, kiu jam gastigis la Junularan Esperanto-Semajnon en 2010 kaj plaĉas al turistoj pro riveretplena arbaro kaj la minoritata kulturo de la soraboj.

La kvaran tagon de la kongreso partoprenantoj jam devis adiaŭi unu la alian. Restos en memoro la sento, ke ne nur dum la kongreso ni estas “partneroj en Eŭropo”. Espereble la plektitaj kontaktoj kaj (ek)flegitaj amikecoj kontribuas al interkompreno kaj eble ankaŭ al pliaj projektoj.

Felix Zesch

IKU en Hanojo kun naŭ prelegantoj

Sekve de profesia prijuĝo de la Komisiono pri Internacia Kongresa Universitato, la Estraro de UEA elektis naŭ prelegojn por la 65a sesio de IKU, okazonta dum la 97a UK en Hanojo. Kiel rektoro de la sesio en Hanojo estis elektita la japana lingvisto prof. Hitoshi Gotoo, kiu estis la IKU-rektoro ankaŭ en la 92a UK en Jokohamo en 2007.

Jen la listo de la prelegoj:

Jonathan Cooper (Aŭstralio): “Moderna arto”;

Mark Fettes (Kanado): “Lernejo kaj naturo en ekologia krizo”;

Laŭlum (Ĉinio): “Lingvo, kulturo, literaturo”;

Stefan MacGill (Hungario): “Vortŝercado en Esperanto”;

Gábor Márkus (Hungario): “Kiu kontrolas la registarojn?”;

Francesco Maurelli (Britio): “Subakva robotiko”;

Jukka Pietiläinen (Finnlando): “Novaĵoj translimen”;

Trevor Steele (Aŭstralio): “Malapero de la tasmaniaj aborigenoj”;

Humphrey Tonkin (Usono): “Esperanto-poezio”.

La prelegoj de Stefan MacGill, Francesco Maurelli kaj Trevor Steele estos samtempe partoj de kursoj de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). La dumkongresaj AIS-kursoj konsistas el po tri prelegoj, el kiuj la IKU-prelego estos la unua, sekvota de du daŭrigaj prelegoj por pli profunda traktado de la temo. Tiu kunlaboro inter UEA kaj AIS kadre de UK komenciĝis jam en 1995.

La prelegotekstoj aperos en la IKU-libro, lanĉota en la UK. Kelkaj antaŭaj volumoj estas ankoraŭ haveblaj ĉe la Libroservo de UEA. **GK UEA**

La Jaro de Sekelj en Subotica

La urbo Subotica (Vojvodino, Serbio), en kiu Tibor Sekelj plej longe aktivis kaj mortis, aliĝis al la Jaro de Tibor Sekelj prifestita en pluraj eŭropaj urboj.

La Ronda Tablo “Vivo kaj Verko de Tibor Sekelj” arigis de la 18a ĝis la 20a de majo en Subotica tridekon da eminentaj partoprenantoj el ses landoj kaj perskribajn kaj perretajn kontribuantojn el pliaj sep landoj. La manifestacio okazis sub aŭspicio de la urbo Subotica, kies urbestro Saša Vučinić malfermis la Rondan Tablon kaj inaŭguris memortabulon ĉe la domo en kiu Tibor Sekelj vivis kaj forpasis.


Partoprenantoj de la Ronda Tablo dum tri tagoj prilumis diversajn facetojn de la vivo kaj agado de Tibor Sekelj, kies nekutima vivovojo, kreopova energio kaj maltrankvila spirito portis lin al ĉiuj anguloj de la mondo, kiun li sentis kaj ĝuis kiel ĝia meritplena civitano.

Erzsebet Sekelj kortuŝe parolis pri la lastaj horoj de sia edzo, kaj Zlatko Tišljar, kiu proklamis la jaron 2012 la “Jaro de Tibor Sekelj”, pri vivfilozofio de Tibor Sekelj. Pri la vivografio de Sekelj raportis Đorđe Dragojlović, kaj personajn rememorojn peris Boriša Milićević pri Tibor Sekelj kiel “humanisto kaj internaciulo”, Tereza Kapista pri “diplomato kaj porinfana verkisto”, kaj Judita Rey pri “ŝatata amiko kaj fidela kunlaboranto”.

Pri Tibor Sekelj kiel verkisto informis Zlatoje Martinov, ĉefredaktoro de la politika magazino *Republika*; Vidosava Tomić, redaktorino de kultura programo de la Serba Radio-Televideo; kaj Dimitrije Janičić, redaktoro de *Beograda Verda Stelo*. Sekvis interesaj kontribuajoj pri restadoj de Tibor Sekelj en Slovakio, Argentino kaj Kostariko.

Ne mankis ankaŭ primovada dimensio de Sekelj prilumita de Josip Pleadin tra *IOE-gazeto* kaj precipe en la prelego de Senad Čolić, kiu klopodis trovi lian lokon dum la unua jarcento de la movado apud la ĉefaj protagonistoj Zamenhof, Lanti, Lapenna kaj laste Tonkin.

Pri kultura parto zorgis la urbo Subotica per du ekspozicioj pri la vivo kaj laboro de Tibor Sekelj en la urba biblioteko kaj pri pupofotoj el Pupteatra Internacia Festivalo, iniciatita de Sekelj en Zagrebo, kaj per impona arta programo en tri lingvoj (serba, hungara kaj Esperanto) de artistoj kaj kulturagantoj de Subotica okazinta en la baroka salonego de la urbodomo.



Tibor Sekelj (1912–1988)

Se oni krome aldonas viziton al la tombo de Tibor Sekelj kaj amasan viziton de ĵurnalistoj al la manifestacio, kompletigaĵas impreso pri ege sukcesa kaj ekstere prestiĝa aranĝo.

Fetah Zvirac

Esperanto, ne nur babil-lingvo

En Karlovo-Sopot (Bulgario) 15–22 jun 2012 okazis la kvara internacia simpozio “Apliko de Esperanto en la profesia agado” (AEP-2012).

Ĝin kunorganizis Bulgara Esperanto-Asocio (BEA), AIS-Bulgario, Internacia Universitato Karlovo, Tutmonda Ortodoksa Ligo Esperantista (TOLE) kaj la Regiona Estraro de la Bulgaria Scienc-Teknika Asocio. La altaj protektantoj estis la urbestro de la komunumo Karlovo d-ro Emil Kabaivanov kaj la urbestro de la komunumo Sopot Veselin Liĉev.

La simpozio estis solene inaŭgurita en la Solena Halo de la urbodomo de Karlovo en ĉeesto de reprezentantoj de oficialaj instancoj, universitatoj, sciencaj organizaĵoj kaj amaskomunikiloj. Anton Minev, la vicurbestro de Karlovo, emfazis la pozitivan rilaton de la urbestro al la agado de la Internacia Universitato Karlovo kaj al la internacia Esperanto-movado kaj esprimis certecon, ke ankaŭ estonte la loka esperantistaro daŭrigos sian agadon por konfirmo de la Karlova regiono kiel scienc-eduka Esperanto-centro.

ARKONES

Poznań (Pollando)

21–23 sep 2012

La oficialaj lingvoj de la simpozio estis Esperanto kaj bulgara, sed kiel laborlingvoj rolis ankaŭ la naciaj lingvoj de la neesperantistaj partoprenantoj. Danke al la rekta tradukado “nacia lingvo — Esperanto — nacia lingvo”, ĉiu neesperantisto havis la eblecon prelegi kaj partopreni la diskutojn.

Dum la simpoziaj tagoj prelegis prof. Renato Corsetti kaj Roberto Pigo (ambaŭ pri lingvistiko), prof. Christer Kiselman (Kiel plej bone faldi triangulon), prof. Bojidar Leonov (Apliko de Esperanto en la patenta agado), Colo Petkov (Naturkuracado per mineraloj), Ivan Necev (La arkitekturaj monumentoj en la regiono Karlovo-Sopot), inĝ. Kosta Nesev (La karlovano Ĝon Noĉev — unu el la konstruktoroj de “Apolo”) k. a.

Interesaj kaj aktivaj estis la diskutoj gviditaj de d-ro Michael Cwik: “Kian Eŭropon ni volas kaj kiel?”, “Solidareco en la Eŭropa Unio, sed kiamaniere?”, “Kiamaniere garantii la kulturajn kaj lingvajn identecojn en mult-kultura ĉirkaŭaĵo?”, “Kia strategio por konservi la lingvan diversecon kaj samtempe ebligi mult-flankan efikan komunikadon?”, “Ĉu ni devus ŝanĝi la ĉarton pri fundamentaj rajtoj de EU por konservi kaj garantii la publikajn tradiciojn en kulturo, lingvo kaj religio je la loka nivelo?”

Kadre de la simpozio okazis la religia seminario “La rolo de la religio por la edukado de la juna generacio”. La seminarion partoprenis reprezentantoj de diversaj religioj, substrekintaj la rolon de la religio eduki la junularon obei la noblajn principojn de la religia etiko, moralo, toleremo kaj kunlaboro inter la kreduloj, sendepende de ilia religia aparteneco.

AEP-2012 estis baza aranĝo en la programo de BEA “125 jarojn Esperanto” kaj kontribuis por propagando pri Esperanto, plialtigo de la intereso flanke de la oficialaj instancoj al la internacia faka Esperanto-agado. La simpozio ludis rolon por apliko de Esperanto en la profesiaj kontaktoj. Tiamaniere ĝi sukcese plenumis sian bazan celon — prezenti antaŭ la neesperantistaj fakuloj kaj oficialuloj, ke Esperanto estas ne nur komuna lingvo por babilado, amuziĝo kaj kontaktoj inter la esperantistoj, sed Esperanto povas esti kaj devas esti oficiala lingvo por kontaktoj kaj kunlaboro en diversaj sciencaj kaj profesiaj fakaj simpozioj.

Bojidar Leonov

Britio ricevis la premion Cigno

La Estraro de Fondaĵo Cigno decidis aljuĝi la Premion Cigno 2012 al Esperanto-Asocio de Britio (EAB). Ilia modela informa agado instigis, interalie, la aperigon de artikoloj en gravaj ĵurnaloj kiel *The Telegraph* kaj *The Economist* kaj pro ilia informa kampanjo kadre de la Internacia Festivalo de Lingvoj ĉe la Universitato de Sheffield ankaŭ la vaste spektata televida programo *BBC Matenmanĝo* atingis pli ol milionon da homoj.

La decido pri la premio ne estis facile farebla, ĉar aliaj Landaj Asocioj kiuj partoprenis la konkurson, montris serioze bravajn klopodojn por konigi la publikon pri nia lingvo. Tio montras valoran engaĝiĝon ene de la Landaj Asocioj prioritati la informan agadon. Gratulon al ĉiuj!

Fondaĵo Cigno estis starigita en decembro 2011 por premii la agadon de Landa Esperanto-Asocio ene de la Eŭropa Unio, kiu plej bone informis la eksteran publikon pri Esperanto dum la periodo de unu jaro.

Ayako Kawakita

Prezidanto de Fondaĵo Cigno

La 75-jara Paco kaj Justeco

12 maj la Bruĝa klubo “Paco kaj Justeco” (Belgio) festis sian 75-jariĝon kun tuttaga kaj varia programo. Matene estis solena akcepto en la urbodomo, kun paroladetoj kaj kantado. Unu el la paroladetoj estis de unu el la fondintoj de nia klubo, Fernand Roose. Lia teksto estis laŭlegita de lia filino pro tio ke li mem pro malsano ne povis ĉeesti.

Post la tagmanĝo ni ĝuis ŝercojn, muzikon de la Bruĝa popolmuzikgrupo *In de klaere maene*, viziton de Zamenhof... kaj dumpaŭze kafon, teon, torton kaj biskvitojn laŭplaĉe. Eblis kunmanĝi ankaŭ vespere, kaj poste ĝui dancigan koncerton de JoMo! Kelkaj partoprenantoj venigis al tiu koncerto ankaŭ siajn neesperantistajn amikojn. Ni celis tion por varbi por Esperanto montrante la etoson kaj muzikon de la lingvo kaj movado.

Ne ĉiuj restis la tutan tagon, sed al ĉiuj programeroj venis ĉ. 50 personoj. Por tiuj kiuj ŝatis profiti de nia jubilea tago por konatiĝi pli kun Bruĝo, ni organizis sekvatage gvidatan promenadon tra la urbo.

Ligiloj al fotoj, filmo kaj gazetaj artikoloj troveblas ĉi tie:

<https://sites.google.com/site/pkj75j/>

Heidi Goes



Venintoj de Kostrena 2012 (Fotis Vjekoslav Morankić)

Pokalo Kostrena 2012

La 11a Konkurso pri scio de Esperanto por lernantoj el elementaj kaj mezaj lernejoj, Pokalo Kostrena 2012, okazis 18–20 maj en la Kroatia apudmara urbo Kostrena.

La konkurso, kunorganizata ĉiujare de Kroatia Esperanto-Ligo, Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto kaj Esperanto Societo Rijeka, okazis en la *Esperanto-Domo*. Ĝin partoprenas lernantoj el lernejoj kie Esperanto estas instruata, kaj lernantoj kiuj mem lernas Esperanton. Ĉi-jare partoprenis gelernantoj el kvin lernejoj: Elementa lernejo (EL) “Mladost” kaj EL “Retkovec” el Zagrebo, EL “Ljudevit Gaj” el Zaprešić, EL “Andrija Mohorovičić” el Matulji, kaj Gimnazio “Antun Vrančić” el Šibenik.

La rezulto de la konkurso.

Kategorio A (komencantoj)

1. Nikolina Senčar, EL “Mladost”
2. Maro Miljanić, EL “Mladost”
3. Filip Šeatović, EL “Ljudevit Gaj”

Kategorio B (progresintoj)

1. Marija Vešnik, EL “Mladost”
2. Dona Dumić, EL “Retkovec”
3. Ana Marinić, EL “Retkovec”

Kategorio C (eseo)

1. Tania Rubić, EL “Retkovec”
2. Luciel Tolo, Gimnazio “Antun Vrančić”
3. Robert Nakić, Gimnazio “Antun Vrančić”

La laŭreatoj ricevis pokalojn. La plej bona lernejo, EL “Mladost” el Zagrebo, estas premiita per la Pokalo Kostrena 2012. Ĉiuj lernantoj ricevis donace la libron *Pirgo* de la konata verkistino

Anđelka Martić en Esperanto-traduko eldonita de *Grafokom* (Đurđevac).

Sabaton vespere okazis Ekologia laborejo “EkoRekoRi”, kiun gvidis Nataša Batistić, la prezidantino de Esperanto-Societo Rijeka Ĝia celo estis instrui al partoprenantoj metodojn recikligi plastikajn saketojn. Pri amuza programo zorgis membroj de Kroatia Esperanto-Junulara Asocio. La gvidanto de la programo estis Boris Di Costanzo, asistantinoj Nataša Batistić kaj Marisa Dabo. La ekzamenkomisionon prezidis Tea Radovanović.

Vjekoslav Morankić

Litovio: Ĵurnalista seminario

12–13 maj ĉe la orientlitovia urbo Aukštadvaris, en la bieno de gesinjoroj Bielinis okazis sukcesa seminario de ĵurnalistoj esperantistoj. Estis jam la 5a seminario, kiun organizis la Asocio de Litoviaj Ĵurnalistoj-Esperantistoj. Partoprenis ĝin 30 personoj, ĉefe amatoraj ĵurnalistoj el Kaŭno, Šiauliai kaj Vilno.

La programo enhavis rondparolon *Mi kaj Esperanto 125* (gvidis J. Laucius kaj A. Antanaitis), paroligan rondon por komencantoj (gvidis V. Šilas), diskuton pri eldonota *Litova almanako* (gvidis A. Piliponis kaj K. Svidenis). Okazis Esperanto-kvizo, kies gajnintoj premie ricevis po speciale fabrikatan tolan saketon kun la emblemo “Esperanto 125”. Oni ĝuis ŝvitbanejon, rostviandaĵon kaj bieron (aŭ sukron). Esperanto-etoson kreis komuna kantado de Esperanto-kantoj (gvidis V. Ĉojjenė).

Vytautas Šilas

Unufraze

★ La Estraro de UEA donis al Olof Petersson (Svedio) k Alisa Nikitina (Ukrainio) stipendion por partopreni trejnkurson pri terminologio, kiu okazos en julio en la Universitato de Vieno kun famaj profesoroj pri terminologio k faka komunikado kiel instruistoj. (GK UEA)

★ 27 jun Marie-France Conde Rey, Konsulo de la E-Civito, partoprenis en la internacia konferenco pri nuntempa sklaveco, organizita de UNPO (Organizo de nereprezentitaj popoloj) en la Eŭropa Parlamento en Bruselo. (HeKo)

★ Reprezentantoj de Pola E-Junularo partoprenis trejnadon pri kreado de evolueblecoj, kiun organizis Pola Konsilio de Junularaj Organizaĵoj 17-20 maj en Sulejówek kunlabore kun European Youth Forum k kun subteno de Ministerio de Nacia Edukado. (PEJ)

★ 26 maj 2012 la vicprezidanto de Unio de amikecaj organizoj de Ho-Ĉi-Min-urbo Phung Cong Dung k lia oficistino respondeca pri Eo, Nguyen Thi Hong Phuong akceptis la Konstantan Kongresan Sekretarion de UEA Clay Magalhães por trakti la organizon de la 97a UK en Hanojo. (Le Thien Thu)

★ Lastatempe Meksika E-Federacio informis pri Eo en la “Semajno de la lingvoj” en la nacia universitato de la urbo Puebla, en la “Tagoj de la lingvoj” en la nacia gimnazio UNAM 7, k en la kultura evento “Huevos revueltos” (kiritaj ovoj). (Landa Agado)

★ 30 maj en la Nacia Parlamenta Biblioteko de Ukrainio en Kievo okazis “Ronda tablo”, dediĉita al la 125-jariĝo de Eo; ĝin akompanis ekspozicio de E-libroj. (Evgenia Slovaĉevskaja)

★ Krom la ĉeesta E-kurso, Jagelona Universitato en Krakovo (Pollando) organizas ankaŭ retan E-instruadon por loĝantoj de aliaj urboj k vilaĝoj kun kelkaj semajnfinaĵaj ĉeestaj studsesioj en Krakovo. (Maria Majerczak)

★ Fondiĝis E-klubo en la universitato Ngozi (Burundo), al kiu aliĝis 15 studentoj. (Universitato)

★ 10 jun 2012 en Tokio la Estraro de Japana E-Instituto (JEI) elektis s-ron Suzuki Keiichiro kiel la prezidanton de JEI. (Landa Agado)

★ En la ĵus aperinta *Jarlibro 2012* de UEA estas adresoj de 1632 delegitoj en 100 landoj je 41 adresoj malpli ol antaŭ unu jaro; entute estas 53 ĉefdelegitoj, 916 lokaj delegitoj, 102 vicdelegitoj, 34 junularaj k 1243 fakaj delegitoj. (GK UEA)

Mini/BMW gratulas Esperanton

La kompanio Bayerische Motoren Werke (BMW grupo) kun siaj markoj BMW, MINI, Husqvarna Motorcycles kaj Rolls-Royce estas unu el la plej sukcesaj produktantoj de altkvalitaj aŭtomobiloj kaj motorcikloj en la mondo. Ĝi havas 25 fabrikojn en 14 landoj kaj tutmondan disvendan reton kun reprezentetoj en pli ol 140 landoj. En 2011 BMW-grupo tutmonde vendis proksimume 1,67 milionojn da aŭtomobiloj kaj pli ol 113.000 motorciklojn. Laŭ informo de EsperantoLand la aŭtomarko “Mini” de BMW la 24an de majo gratulis Esperanton okaze de la 125a naskiĝdatreveno, dezirinte en Esperanto “feliĉan naskiĝtagon”.

La prestiĝa entrepreno BMW eldonis gazetaran komunikon pri tio en la germana lingvo. La gratulo disponeblas ankaŭ en Esperanto. Ĉi-sube estas ĝia plena teksto (kun kelkaj korektitaj mistajpoj).

Munkeno. MINI gratulas pro la 125a naskiĝtago al la internacie konata kaj preskaŭ tutmonde uzata artefarita lingvo Esperanto. Kaj la brita altkvalita aŭtomobilo, kies antaŭa modelo unuafoje produktiĝis en 1959, kaj Esperanto havas longan, eventoplenan historion kaj vastan popularecon tra plej diversaj kulturoj. La kreado kaj disvastigo de la planlingvo Esperanto estas la verko de la okulkuracisto kaj lingvisto Ludwik Lejzer Zamenhof. Li publikigis en 1887 sub la pseŭdonimo “Doktoro Esperanto” en Varsovio libreton, en kiu li priskribis la fundamenton por tutmonde komprenebla kaj universale uzebla lingvo. 125 jarojn poste oni parolas Esperanton en ĉiuj kontinentoj. Internacia historio de sukcesoj – tutsimila al tiu de la aŭtomobilo MINI.

Ludwik Zamenhof naskiĝis en 1859 kiel filo de lingvo-instruisto en la nun pola urbo Białystok, kiu tiam apartenis al Rusio. Celante verki facile lerneblan kaj neŭtralan lingvon kun klara kaj simpla gramatiko por la internacia interkompreniĝo de popoloj, li kreis la planlingvon Esperanto. Por fari tion, li kombinis elementojn de latinidaj, ĝermanaj kaj slavaj lingvoj. Rapide formiĝis en kelkaj eŭropaj ŝtatoj la unuaj Esperanto-asocioj, sed la politikaj cirkonstancoj de la 20a jarcento plurfoje malfaciligis la disvastigon de la lingvo. Kiel elemento de la interkompreniĝo de popoloj Esperanto tamen havis ĉiam kreskantan akcepton tra ĉiuj kontinentoj.

Same kiel la MINI, kiu hodiaŭ estas en pli ol 100 merkatoj en la tuta mondo, ankaŭ Esperanto evoluis al internacia fenomeno. La artefarita lingvo hodiaŭ estas parolata en pli ol 100 landoj. Radiostacioj en Ĉinio, Kanado, Koreo, Aŭstralio kaj aliaj landoj regule elsendas en Esperanto, kaj ankaŭ en la interreto la planlingvo estas tre ŝatata. La serĉilo Google, la interreta telefonservo Skype, la reta enciklopedio Wikipedia kaj la retumilo Firefox “parolas” Esperanton. Dum la jardekoj ekestis daŭre kreskanta komunumo de amikoj kaj uzantoj de la lingvo – en sia strukturo simile diverseca kaj kosmopolita kiel la internacia MINI-komunumo. Malgraŭ la histori plena aĝo Esperanto daŭre restis juna kaj aktuala. Paralele al la kreskantaj postuloj de la tutmondiĝo kaj la nuntempa, moderna vivstilo Esperanto daŭre adaptas sian kreskantan vortaron al la novaj cirkonstancoj kaj defioj. Tiamaniere Esperanto samtempe signifas tradicion kaj modernigon – tutsame kiel la MINI.

Mallonge dirite: MINI kaj Esperanto havas kelkajn komunajn trajtojn. Ambaŭ estas kosmopolitoj, kunligas generaciojn kaj kontinentojn. Eĉ se ili havas siajn radikojn en Eŭropo, ili tamen hejmas en la tuta mondo. Pro tio MINI deziras en plej esperanta Esperanto “Feliĉan naskiĝtagon!” kaj ĉion bonan por la venontaj 125 jaroj!



Ĉu ankoraŭ savi la planedon?

de Dafydd ab Iago

Daŭraj diskutoj pri la problemoj de la eŭro-zono grave efikas al la laboro kaj ambicioj de la Eŭropa Unio en aliaj kampoj. Dum longa tempo politikistoj en Bruselo fieris, prave aŭ neprave, pri sia laboro por la klimato. Nun pli kaj pli ŝajnas, ke ne plu eblas progresi sen ŝanĝi la decido-sistemon, kiu ebligas nur al unu el la 27 EU-landoj bremsi la akceptadon de gravaj decidoj.

Kiam temas pri rezoluta reago al la klimata-minacoj, Pollando nun ludas la rolon, kiun antaŭe ludis Britio. En marto kaj junio ĉi-jare kaj en junio 2011 Pollando diris “ne” al pli ambicia malaltigo de karbono-emisioj. Pollando malakceptas ĉiujn menciojn de la vorto “karbono” cele al malaltigo de nia dependeco de fosiliaj brulaĵoj.

Kvankam la financa krizo enfokusigas la amaskomunikilojn ne pri mediprotektado, sed pri financo, la ontaj mediaj problemoj daŭre tuŝas ĉiujn sur la planedo. Eĉ se EU interkonsentis pri nova leĝaro por stimuli energian efikecon, ĝi ne atingos la celon ŝpari ĝis 2020 dudek procentojn de la energio kiun ni uzas. EU-landoj ne povis interkonsenti pri pli da devigo por atingi tiun celon.

Devigo mankas ankaŭ por fortigo de la Eŭropa karbonmerkato, kiu celas malpliigi forcejgasajn ellasojn (EU ETS laŭ la anglaj sigloj). Tio estas ŝlosila parto de la celado haltigi la klimatsanĝojn. Sed nun la prezo, kiun pagas firmaoj ellasantaj karbondioksidon, estas tiom malalta, ke ili ne havas stimulon investi en novaj teĥnologioj, kiuj movus la Eŭropan ekonomion al senkarbona estonteco.

Kapti iom da rigardoj kaj esti filmata en alia kunteksto estis, sendube, unu el la kialoj por vojaĝo de kvin komisionanoj, inkluzive de José Manuel Barroso, prezidanto de la Komisiono, kun eskorto de pli ol 60 homoj, al granda konferenco en Rio-de-Ĵanejro.

Ili estis en la plej bunta urbo de Brazilo por festi la dudekan datrevenon de la UN-pintkunveno por medio kaj evoluo en Rio-de-Ĵanejro. Tie la komisionestro Barroso parolis pri la



La prezidanto de EK Barroso flugis al Rio por nemulton diri. (Foto: Eŭropa Komisiono)

verda ekonomio kiel grava ŝlosilo por movi homaron al daŭripova evoluo. “Tio signifas promocii ekonomion kiu respektas la limojn de nia planedo, kreante bonajn laborpostojn, plifortigante socian koherecon, atakante malriĉecon kaj plibonigante nutraĵan sekurecon”, — li diris.

La vortoj de Barroso aspektas tre ambiciaj. Kaj la pintkunveno en Rio-de-Ĵanejro vere pritraktis gravajn demandojn por certigi bonan laboron, energion, daŭripovajn urbojn, nutraĵan sekurecon, daŭripovan agrikulturon, akvon kaj respondante al katastrofoj kaj minacoj por niaj maroj.

Tamen Mara Yannakoudakis, konservativa membro de la Londona parlamento, ne konsentas kun la alta elspezado por la konferenco, kiu ja ne donis rimarkeblajn rezultojn. Ŝi kritikis la koston de pli ol 500 mil eŭroj por flugigi al Rio kvin membrojn de la Eŭropa Komisiono kun 60-persona akompanantaro. Ŝi taksas la ellasojn de karbonaj emisioj, kaŭzitaĵoj de la flugado, je 300 tunoj. Pro tiuj superaltaj kostoj, la media komitato de la Eŭropa Parlamento decidis ne vojaĝi al Rio. Sed ne tiel agis la Eŭropa Komisiono sub la prezidanto Barroso. “Konservi la planedon ne devus kosti la teron”, — diris Yannakoudakis. Ankaŭ ŝi estas membro de la medio-protektada komitato de la Eŭropa Parlamento.

Mazara: La instruado daŭros

Itala Esperanto-Federacio (IEF) kaj Kosmo Strategio Ltd. ĝoje anoncas ke Eŭropa Unio subtenos la Esperanto-instruadon en Mazara del Vallo, danke al la programo Grundtvig Asistado. Esperantisto el Belgio ricevos stipendion por translokiĝi al Mazara kaj kunlabori kun la tieaj agadoj de IEF dum la periodo oktobro 2012 – januaro 2013.

La rilatoj inter Esperanto kaj Mazara del Vallo komenciĝis kiam IEF serĉis lokon por gastigi sian jaran kongreson. Ĝi trovis ne nur tion, sed malferman urbon, kiu tre entuziasme interesiĝis pri la internacia lingvo. Baldaŭ malfermiĝis Centro por Esperanto kaj Interkulturo kaj komenciĝis kursoj en pluraj lernejoj de la urbo.

Aldo Grassini, prezidanto de IEF, rakontas: “En la nuna lernoĵaro, IEF aranĝis kursojn por pli ol 500 homoj, kaj pli da kursoj estas jam planataj por la venonta. Sen la helpo de EU estus vere malfacile mem financi tiun gravegan agadon!”

Ekde januaro 2012, instruis en Mazara del Vallo Márta Kovács, Svetlana Smetanina, Szabolcz Szilva kaj Konstantin

Tiĥomirov, al kiuj iras grandega danko. Tio estas grava sukceso ankaŭ por Kosmo, esperantista entrepreno kiu helpis la pretigon de la kandidatigpropono. “Ni tre fieras pri tiu ĉi sukceso. Kosmo naskiĝis por helpi la Esperanto-movadon, kaj tiu ĉi ekzemplo klare montras ĝian efikon: gravega projekto por la tuta Esperanto-movado estis en danĝero pro manko da rimedoj, kaj Kosmo sukcese zorgis tiel ke Esperanto-instruado estu pagita de EU”, — komentis Sara Spano, respondeculo pri Italio por Kosmo.

Pluraj eventoj okazos en la venontaj monatoj en Mazara: la kongreso de Esperanto en Italio (jam pli ol 300 aliĝintoj) gastigos seminarion subtenitan de EU kaj profesian trejn-kurson pri metodiko.

Kosmo Strategio Ltd. estas skota esperantista entrepreno, kiu celas helpi la Esperanto-mondon akiri subvenciojn, mastrumi projektojn, plani agadojn. Oficiale registrita en aprilo 2011, ĝi havas kvin kunlaborantojn kaj havas rilatojn kun dekoj da organizoj, universitatoj kaj malgrandaj entreprenoj — ne nur Esperantistaj.

Francesco Maurelli

Esperanto-hotelo en Herzberg

En majo 2012 malfermiĝis en Sieber, urboparto de la Esperanto-urbo Herzberg, la esperantlingva hotelo *Zum Pass*. Ĉi tiu tristela hotelo kun pli ol 20 litoj troviĝas apud la Nacia Parko Harz. Tuj ĉe la hotelo troviĝas la nova migradvojo Baudenstieg inter la allogaj montoj Hanskühnenburg kaj Großer Knollen — du famaj ekskursceloj.

La hotelon *Zum Pass* posedas la esperantistino Barbara Khan el Varsovio, kiu havas fakkompetenton pri hotelmastrumado kaj gastronomio. Helpas ŝin ŝia patrino, esperantistino Teresa Liberska el Poznano.

La kafejo kaj restoracio havas trilingvan manĝokarton (en Esperanto, germana kaj angla). En la restoracio kuiras kaj bakas fama kuiristo, kiu antaŭe laboris en kvarstela hotelo en Gdansk. Al la restoracio apartenas granda salono, taŭga por festoj, dancado, kunvenoj, k. s. La hotelo situas sur granda tereno kun bierĝardeno, parklokoj kaj kiosko. **ICH**



ESF: La estraro ŝanĝiĝis

Kadre de planita transiro, Humphrey Tonkin emeritiĝis de la prezidanteco de ESF (Esperantic Studies Foundation) dum la aprila kunsido de la ESF-estraro. La Estraro unuanime aprobis Vic-prezidanton Mark Fettes kiel lian sukcedanton.

Tonkin estis prezidanto de la Fondaĵo ekde ĝia fondiĝo en 1968.

“La gvido de d-ro Tonkin estis esenca por la disvolviĝo de ESF”, — diris Fettes, profesoro de la universitato Simon Fraser en Kanado. — “Mi tre kontentas ke li restos en la Estraro, kie ni povos daŭre profiti de lia sperto kaj saĝo”.

En lia fina Prezidant-raporto al la Estraro, Tonkin rimarkis ke ESF iras en “novajn direktojn” per “grandskala investado en klopodoj plividebligi Esperanton en la interreto”.

“Estas granda ŝanĝiĝo por ni, kvankam ĝi estas la kulmino de nia laboro dum la lasta jardeko”, — konfirmis Fettes. “Ni transiras de ĉefemfazo pri esplorado kaj akademia studado al pli anticipa investado en la disvolviĝo de la interreta Esperanto-komunumo. Ni vidas ĉi tion kiel aliron kiu, longperspektive, ebligas nin ampleksigi ankaŭ nian tradician esploron”.

Aliaj ŝanĝiĝoj en la Estraro: Derek Roff elektiĝis Vic-prezidanto, aliĝante al jama Vic-prezidanto Grant Goodall. Anna Bennett kaj Bonnie Fonseca-Greber restas en la Estraro kiel Kasisto kaj Sekretario respektive, kune kun estraranoj Geoffrey Greatrex kaj Wally Du Temple. **ESF**

La Artista Datumbazo reaktiviĝas

La Artista Datumbazo estis kreita en la jaro 2005 de E@I, EUROKKA kaj TEJO, sub la gvido de David Emil Wickström, kiu tiam aktivis en ĉiuj tiuj organizoj. Ĝi malaktiviĝis ekde 2008 pro manko de kunlaborantoj. Dum lastaj monatoj okazas reaktualigo, ĝisdatigado kaj restrukturigo (samtempe kun la teknikaj ŝanĝoj de la tuta retejo) fare de nova teamo (anoj de E@I, EUROKKA, Muzaiko, TEJO, kaj UEA). La celo estas kompletigi kaj vivigi la Artistan Datumbazon en pli ampleksa formo kaj kun novaj artaj kampoj — krom muziko aldoniĝos ankaŭ teatro, literaturo, kino/video ktp. La renovigo daŭros la tutan someron kaj ni povas esperi, ke la publika remalfermo de ĝi okazos tuj post la somero 2012 kun novaj vestoj kaj funkcioj. La nova retejo estos t. n. Vikio-paĝo — kiel komunuma portalo, kie ĉiu rajtos kontribui al ĝi kaj estos bonvena vigligi, ĝisdatigi, pliriĉigi ĝin.

La Artista Datumbazo estas tre grava ilo por la vivanta Esperanto-kulturo. Ĝi utilas por strukturi kaj helpi la organizadon de kulturaj interŝanĝoj inter ĉiuj agantoj por la Esperanto-kulturo (artistoj, grupoj, organizantoj, gazetaro, disvastigado de Esperanto-kulturo, ktp.). Ĝi faciligas la kontaktojn, por trovi artistojn por organizi koncertojn kaj festivalojn, sed ankaŭ helpas al artistoj, kiuj organizas turneon, aŭ por trovi koncertojn, produktojn, eldonejojn, gazetojn por recenzi, radiojn, praktikajn konsilojn, modelojn, lingvan terminologion, teknikon, ktp. Ankaŭ ĝi utilas por interligi artistojn inter si kaj okazigi interesajn interŝanĝojn, malkovrigi la vivantan Esperanto-kulturon kaj varbi por ĝi.

Ekzistas pluraj ebloj helpi realigi la projekton:

a) **Artistoj.** Kiuj ankoraŭ ne anoncis sin por ĝisdatigo aŭ eniro en la Artistan Datumbazon, bonvolu kiel eble plej baldaŭ kontakti la teamon de AD ĉe: artista@ikso.net

b) **Volontuloj.** Se vi havas kelkajn liberajn horojn kaj emas helpi por vivteni la Artistan Datumbazon (diversmaniere, laŭ la aktualaj bezonoj kaj ebloj), bv. kontakti nin.

c) **Donacantoj.** Se vi emus finance subteni la projekton, eblas fari tion plurmaniere. Vi povas donaci monon al la UEA-konto de E@I “eĉi-v”, aŭ sendi per PayPal al la adreso: financoj@ikso.net (Bv. mencii “Artista Datumbazo” en la mesaĝo por ricevanto.) La donacita mono estos uzita ĉefe por reklamado de la projekto (presado de informiloj, afiŝoj, glumarkoj), kaj por teknikaj pagoj (servilo-kostoj ktp.).

<http://artista.ikso.net>

Peter Baláž (E@I), Flo Martorell (Vinilkosmo)

INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUTO

Riouwstraat 172, 2585 HW Den Haag, Nederlando

iesperanto@versatel.nl

www.iei.nl

vendas proprajn eldonaĵojn, interalie:

Baza Cseh-kurso (Cseh, 1992).....€ 15,-

Esprimo de sentoj (Privat, 1995) ... € 18,-

Konversacia vortaro (Cseh, 2010) ..€ 13,-

Urug: romano (Haase, 2012).....€ 13,-

kaj aliajn novajn kaj brokantajn librojn.

Zamenhof kaj ties emocioj pri Volapük

Eseo de Andreas Künzli

Ĉi-somere la amikoj de la internacilingva ideo havas du gravajn datrevenojn: 125-jariĝo de Esperanto (la Unua Libro de Zamenhof aperis la 26an de julio 1887) kaj la 100a mortdato de Johann Martin Schleyer (la aŭtoro de Volapük forpasis la 16an de aŭgusto 1912).

Schleyer kaj lia lingvo Volapük estis plurfoje menciita en la verkaro de Zamenhof, ĉar la aŭtoro de Esperanto evidente forte emociiĝis, kiam li eksciis, ke antaŭ li alia homo inventis kaj prezentis internacian neŭtralan planlingvon, kiu ŝajnis plenumi la mondlingvan revon de la homaro, arigante ĉirkaŭ si certan nombron da apogantoj, simpatiantoj kaj lernantoj. Sed Zamenhof baldaŭ komprenis, ke Volapük pro sia troa artefariteco tute ne taŭgas kiel mondlingvo kaj ankaŭ ne hezitis diri tion al Schleyer kaj al la publiko. Sed Schleyer malŝatis kaj rifuzis ĉian kritikon kontraŭ Volapük kaj lia persono, do varma rilato inter li kaj Zamenhof, kiun Schleyer probable konsideris kiel rivalon, ne povis estiĝi.

Zamenhof skribis, ke li sentis sin feliĉa, ke iu antaŭ li sukcesis solvi la demandon de la mondlingvo kaj realigi lian propran revon. En letero de 2-III-1907 Zamenhof konfesis al Julius Riegel: “kreante mian lingvon mi ne sciis pri Volapük, ĉar ĝi tiam ankoraŭ ne ekzistis”.

Ŝajnas, ke Zamenhof eksciis pri la apero de Volapük per gazeta anonco. Samtempe li deprimiĝis, ĉar lin ĉirkaŭis la malagrable sento, ke iu estis pli rapida ol li kaj ke lia propra vivocelo elvaporigis. Sed kiam li pli atente analizis la Ŝlejeran lingvon, li ne kredis, ke tiu idiomo povas esti la vera solvo de la mondlingva problemo kaj daŭrigis dediĉi sin al sia propra projekto.

Unufoje Zamenhof menciis Volapükon eksplicite jam en la antaŭparolo de sia *Unua libro de la Internacia Lingvo* de 1887, klarigante la eksterajn cirkonstancojn de la apero de Esperanto. Li eble iom cinike komentis ilin tiel, ke Volapük “akiris certan nombron da adeptoj, la ideo mem de lingvo ‘tutmonda’ estas tiel alta kaj alloga, ke homoj, kiuj havas la inklinon entuziasmiĝi kaj dediĉi sin al pionireco, oferas sian tempon en la espero, ke eble la afero sukcesos”. Sed ĉar “la malvarma indiferenta mondo (jam Schleyer plendis pro tio) ne volos oferi sian tempon por tio [...], tiu ĉi lingvo, simile al la antaŭaj provoj, mortos, alportinte absolute nenian utilon”. Ĉar Zamenhof ne estis konvinkita pri Volapük, kiel alternativon li do prezentis sian Esperanton, kvankam li sentis sin “nek pli talenta, nek pli energia” ol la antaŭaj aŭtoroj de “ĉiuj senfrukte pereintaj provoj”.

Unua letero de Zamenhof al Schleyer

Tamen, en letero de 27-XI-1887 al Schleyer Zamenhof montris sin diplomata, adorea kaj afabla, tamen ne senkritika. Verkante sian leteron en Esperanto, Zamenhof proponis sian personan amikecon kaj esprimis la volon ne kontraŭbatali Volapükon, sed labori por la mondlingva ideo:

Estimata kaj estiminda sinjoro! Mi sendas al Vi la frukton de mia longa laborado; ĝi estu signo de mia profunda estimio por la nobla idealisto, kiu laboris por la homaro,

ne timante la ridegon de l’amaso. Mi mem plej bone komprenas kiom Vi devis suferi, ĉar mi mem trairis similan vojon [...] Kiam mi antaŭ 5 jaroj aŭdis pri la Volapük, mi ne forĵetis mian laboron, ĉar la konstruo de Volapük ŝajnis al mi ne tute praktika; mi diris al mi, ke lingvo tutamonda devas esti antaŭ ĉio *komprenebla*, kaj la tuta granda materialo, kiu jam per si mem fariĝis *internacia*, devas resti ne tuŝita. En lingvo, kiu devas fariĝi tutamonda, oni povas *krei* nur la malgrandan parton, kiu estas malsimila en malsimilaj lingvoj; ĉio cetera devas resti *ne tuŝita*. [...] Mi estimas Vian noblan deziron porti utilon al la homaro; kun plena estimio por la aŭtoro de Volapük, mi laboras *ne kontraŭ* la Volapük, sed *por* la ideo. Sankta estas por mi la ideo de lingvo tutamonda, kaj en kiu ajn formo l’homaro ĝin havos, mi estos kontenta kaj feliĉa. Se oni montros al mi, ke mia laboro estas malutila al la ideo, mi mem detruos mian laboron, kvankam mi oferis al ĝi la plej bonan parton de mia vivo. [...] Aŭ unu de la lingvoj mortos per si mem, aŭ la homaro havos *du* lingvojn, kaj eĉ tio estas por la mondo multe pli bone, ol resti tute sen lingvo tutamonda. Pardonu ke mi skribas al Vi en mia lingvo; mi faras ĝin ne pro malĝentilo, sed por doni al Vi provon de mia lingvo. Kun la plej granda estimio. Esperanto.

Zamenhof denuncas Volapükon ĉe ruslandaj instancoj

Por pravigi sian lingvon, en sia petskribo de la 12-IX-1888 al la estro de la ĉefa Administracio por presaferoj por peti la eldonon de ĉiusemajna folieto en Esperanto, Zamenhof notis en sia klarigo pri Volapük jenon:

“Volapük” [...] havas tamen en si nenion internacian: ĝi estas lingvo arbitre elpensita, al neniu komprenebla kaj de neniu (krom certa nombro da adeptoj) agnoskita. Utilo de tiu ĉi lingvo estas do [...] eksterordinare dubebla: se mondo akceptos tiun ĉi lingvon, ĝi estos utila, – sed se mondo ĝin ne akceptos, tiam ĝi nenian signifon havos kaj tute nenian utilon alportos al siaj adeptoj.

Ĉar Zamenhof bezonis la permeson por sia Esperanto-eldonaĵo, li ne preterlasis la okazon laŭdi sian propran lingvo-projekton malfavore al la konkurenulo Volapük.

La fama traktaĵo en *La Esperantisto*

En la detala traktaĵo *Esperanto kaj Volapük*, kiu aperis fine de 1889 kaj komence de 1890 en la ĵurnalo *La Esperantisto*, eldonita en Nurenbergo, Zamenhof analizis la lingvon de Schleyer ja bonvole, tamen tre kritike. Kerne, en tiu ĉi arda





La germana rom-katolika pastro kaj verkisto Johann Martin Schleyer (1831–1912) estas eternigita en la historio de l' homaro, kiel la unua persono, kies lingvoprojekto iĝis lingvo, uzata internacie de miloj da homoj kaj pluraj institucioj.

kaj iom polemika artikolo Zamenhof kulpigis la lingvon Volapük kaj ĝian inventinton esti malfavore influantaj la evoluon kaj progreson de la internacilingvaj ideo kaj movado. Jen kelkaj ĉefaj citeroj el tiu fama, sed eble iom forgesita Zamenhofa traktaĵo:

Antaŭ 10 jaroj estis proponita arta lingvo sub la nomo “Volapük”. La mondo estis jam sufiĉe preparita por lingvo tutmonda kaj atendis senpacience ke post ĉiuj teoriaj projektoj kaj provoj oni prezentu al ĝi fine ion pretan; kaj kiam sinjoro Schleyer diris: “jen vi havas pretan lingvon tutmondan, venu kaj laboru!” – tiam amasoj da idealistoj sin ĵetis al tiu ĉi voko blinde kaj tute ne demandante sin, kion oni donis al ili sub la nomo de lingvo tutmonda, ĉu ĝi estas efektive lingvo faciliganta la interkomunikiĝon internacian kaj ĉu ĝi povas efektive iam fariĝi lingvo tutmonda, aŭ ĝi estas nur uzurpatoro, kiu tute sen rajto kaj fondo alprenis nomon ne apartenantan al ĝi. [...] Sed vi vidas, sinjoroj, ke ĝi estas tute ne tiel: Volapük ne faciligis, sed forte malfaciligis tiun ĉi batalon [...]. Kie Volapük en sia tempo renkontis malamikojn, tie ankaŭ la novaj sistemoj renkontis tiujn samajn malamikojn, ankoraŭ pli obstinajn, ĉar la “naskiĝado de ĉiam novaj lingvoj tutmondaj” aldonis ankoraŭ pli da nutro al ilia ridado; kaj kie Volapük renkontis amikojn, tie la novaj sistemoj jam rekte renkontis [...] malamikojn ne pasivajn, sed penantajn rekte ilin detruiri. [...] Tiaj estis la malfavoraj cirkonstancoj, inter kiuj devis sin prezenti al la publiko la lingvo Esperanto. [...] Eldonistoj neniel volis preni sur sin la eldonadon de mia verko: “jam ekzistas ja Volapük” oni diris al mi ĉie.

Sed laŭ Zamenhof lia nova lingvo internacia savis al aferon: Sed kiam la lingvo Esperanto sin montris publike, la afero aliformiĝis. [...] La lingvo Esperanto baldaŭ ricevis multegon da amikoj, de kiuj la nombro konstante kaj senhalte kreskas. [...] [Ili] fariĝis varmegaj amikoj de la lingvo Esperanto, ĉar ili vidis, ke ĝi estas lingvo efektive praktika, alportanta senkondiĉan utilon kaj havanta estontecon. [...] [Ili] konfesis al mi, ke ili vidas en Esperanto la solan kaj la plej bonan vojon por atingi nian celon, kaj ili korespondas tre bone en tiu ĉi lingvo. [Sed] multaj volapükistoj, kiuj nun fariĝis varmegaj amikoj de la lingvo Esperanto, konfesis al mi, ke, eĉ havante mian libron, ili longan tempon ne volis ĝin eĉ legi, estante konvinkitaj, ke ĉia nova sistemo estas absolute malutila! [...] Sed estas inter la volapükistoj ankaŭ tiaj personoj, kiuj ne fermis la okulojn por la nova movo.

Cetere, Zamenhof atentigis, ke lia «laboro ne estis elvokita de la “ sukcesoj de Volapük”, kiel pensas kelkaj volapükistoj» kaj ke kiam li “antaŭ 13 jaroj komencis” sian “laboron, tiam Volapük ankoraŭ ne estis en la mondo.”

Malfavora pritaksado de Volapük

La analizo mem pri la lingvo Volapük fare de Zamenhof estis malfavora, fakte detrua, la maniero disŝira, la tono polemika. Jen estu ĉerpitaj la esencaj eroj de tiu kritiko, publikigita en *La Esperantisto*, kiuj ne estas sen persona mokado flanke de Zamenhof, kiu aŭdacis kompari Volapükon kun la lingvoj hotentota kaj turka:

Kio estas Volapük? Ĝi estas arta kaj arbitre elpensita lingvo, kiun neniu en la mondo komprenas kaj per kiu vi kun neniu povas komunikiĝi. Ĝi estas nomita lingvo tutmonda nur pro tio, ke *se la tuta mondo ĝin ellernos, tiam ĉiuj ĝin komprenos!* Nenian alian econ tutmondan tiu ĉi lingvo havas, kaj sinjoro Schleyer eĉ ne trovis necese peni doni al sia lingvo iajn ecojn, per kiuj ĝi povus faciligi la komunikiĝojn internaciajn! “La tuta mondo ellernu Volapük’on”, diris sinjoro Schleyer, “kaj tiam ĝi alportos al la mondo grandegan utilon!” Kaj multaj obeis tiun ĉi vokon, ne vidante, kiom da ridinda estas en ĝi! Kaj antaŭvidante, kian grandegan utilon la Volapük alportos al la mondo, se la tuta mondo ĝin akceptos, la amikoj de sinjoro Schleyer jam kun entuziasmo nomas lin la plej granda genio de l’homaro! Sinjoroj, ĉu vi efektive ne vidas, kiel ridinda ĝi estas? Ja ĉia lingvo, eĉ la lingvo de Hotentotoj, alportos al la mondo grandegan utilon, *se la tuta mondo ĝin akceptos!* Kial do oni bezonis elpensi Volapük’on? [...] Ĉu efektive, sinjoroj Volapükistoj, vi estas tiel naivaj aŭ tiel blindigitaj de entuziasmo, ke vi ne vidas, ke la tuta malfacileco de la demando, super kiu la homaro laboras jam tiel longe, estas en la trovado de tia lingvo, kiu *per si mem* ebligus la komunikiĝojn internaciajn, kaj ne de tia lingvo, kiu povus fariĝi tutmonda, se la tuta mondo ĝin akceptos?

En la sekva parto de la analizo de Volapük Zamenhof prezentis ĉefe negativajn trajtojn. Zamenhof opiniis, ke Volapük ne estas belsona kaj ke ĝiaj sonoj estas “sovaĝaj”. Al Schleyer li riproĉis, ke “neniaj gravaj leĝoj ligis” lin, ke “pri la komprenebleco de la vortoj” li “ne zorgis” kaj ke li “kreis la vortojn kiel li volis”. Koncerne la prononcon (elparoleblon), Zamenhof kritikis la Volapük-aŭtoron, ke li “se ia litero ne plaĉis al li, kuraĝe elĵetis ĝin” kiel en la kazo de r. Aliflanke, Zamenhof trovis malbone, ke “la tuta Volapük estas plena je la literoj ä, ö, ü, kiujn la plej granda parto de l’mondo neniel povas elparoli”. Zamenhof opiniis, ke en Volapük oni povas skribi, sed preskaŭ neniu povas en ĝi *paroli*, kaj ke “la plej bona volapükisto ne povos sin orienti en tiu ĉi sovaĝa labirinto.” La laŭdiran facilecon de la gramatiko kaj mallongecon de la vortoj de Volapük Zamenhof pritaksis nur “ŝajnaj”. Konklude: “Volapük ne sole ne estas pli facila ol la lingvoj naturaj, sed estas ankoraŭ *pli malfacila* ol ili!” Do, laŭ Zamenhof Volapük ne “estis ia aparta genia penso de sinjoro Schleyer” kaj ne taŭgis por la internacia komunikado.

Ŝajnas ke Zamenhof tamen iom kompatis la inventinton de Volapük, se li aldonis:

Sinjoro Schleyer pardonu al mi, se mi detruis lian ĉefan aŭreolon, se mi faris nulon el tio, kion liaj amikoj nomas lia plej ĉefa merito. Mi faris tion ĉi ne ĉar mi envius liajn laŭrojn aŭ volus malgrandigi lian indon; kontraŭe, mi

alte estimas s-ron Schleyer kaj donas plenan konfeson al liaj grandegaj laboroj kaj al lia nobla deziro alporti utilon al la homaro. Mi pli ol iu alia scias, kian grandegan laboron kaj feran paciencon postulas la kreado de kiu ajn arta lingvo, kaj se en laboro de s-ro Schleyer mi vidas malfeliĉan provon, konstruitan sur erara fundamento kaj ne havantan estontecon, mi en ĉiu okazo la laboron kaj la bonan deziron de s-ro Schleyer tenas tre alte. Sed mi ne povas vidi *meriton* tie, kie absolute neniam ekzistas.

Diversokazaj omaĝoj al Schleyer

Do, oni nepre devas distingi inter du sintenoj: Unuflanke Zamenhof alte taksis la meritojn de Schleyer por la mondlingva ideo, aliflanke li akre kritikis lian produkton Volapük, kiun li konsideris malsukcesa provo kiel konkreta lingvo internacia.

Ankaŭ en la Zamenhofa teksto *Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia*, verkita en 1898 kaj aldonita al la *Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto* (1903) konfirmiĝis la opinio de Zamenhof pri Volapük kaj Schleyer:

Parolante pri la pliboneco de Esperanto antaŭ Volapük, ni tute ne intencas per tio ĉi malgrandigi la meritojn de la elpensinto de Volapük. La meritoj de Schleyer estas grandegaj kaj lia nomo ĉiam staros sur la plej honora loko en la historio de la ideo de lingvo internacia.

Spite al sia negativa opinio pri la lingvo Volapük, Zamenhof neniam forgesis omaĝi la inventinton de Volapük en konvenaj momentoj, eĉ okaze de siaj kongresaj paroladoj, komencante en la 1a Universala Kongreso de Esperanto en Bulonĵo-ĉe-Marzo mem (1905), kie estis diritaj jenaj frazoj de Zamenhof:

En la unua kongreso de la esperantistoj estas necese diri kelkajn vortojn pri la ĝisnunaj batalantoj de nia afero. Sed antaŭ ol mi parolos pri la batalantoj speciale esperantistaj, mi sentas la devon diri ĉi tie kelkajn vortojn pri unu homo, kiu havas tre grandajn meritojn en nia afero kaj al kiu bedaŭrinde la esperantistoj ofte rilatas maljuste nur tial, ĉar li, multe farinte por la ideo de lingvo internacia ĝenerale, ne apartenas tamen al la amikoj de tiu speciala lingva formo, por kiu ni batalas. Mi parolas pri la tre estiminda sinjoro Johann Martin Schleyer, la aŭtoro de Volapük. La lingva formo, por kiu laboris tiu respektinda maljunulo, montriĝis ne praktika; la vojo, kiun li elektis, montriĝis ne bona, kaj la afero, por kiu li batalis, baldaŭ falis, kaj per sia falo ĝi alportis grandan malutilon al nia ideo entute kaj precipe al tiu speciala formo de la ideo, por kiu ni batalas. Sed ni devas esti justaj, ni devas taksi ĉiun homon ne laŭ lia venko aŭ malvenko, sed laŭ liaj laboroj. Kaj la laboroj kaj meritoj de sinjoro Schleyer estis tre grandaj. [...] Li estis la unua, kiu per senlaca laborado vekis la intereson de la mondo por la ideo de lingvo neŭtrala, kaj ĝi ne estas lia kulpo, se lia falinta afero por longa tempo malvarmigis la mondon por ĉia arta lingvo. Li volis fari grandan bonon, kaj por la atingo de tiu bono li laboris tre multe kaj fervore, kaj ni devas lin taksi ne laŭ lia sukceso, sed laŭ lia volo kaj laboro. [...] la nomo de Schleyer okupos ĉiam la plej honoran lokon en la historio de nia ideo, kaj tiun ĉi nomon la mondo neniam forgesos.

Kaj en la nomo de la kongresanoj Zamenhof sincere dankis pro lia grava kontribuo al la planlingva ideo.

En sia parolado okaze de la 4a Universala Kongreso de Esperanto en Dresdono (1908) Johann Martin Schleyer denove ricevis la honoron esti menciita. Tiam Zamenhof emfazis:

Dank' al la neforgesebla granda merito de la pastro Johann Martin Schleyer, nia ideo ricevis sian unuan disvolviĝon kaj la unuan potencon puŝon antaŭen.

Kiam Schleyer fariĝis okdekjara, Zamenhof trovis en la parolado por la 7a Universala Kongreso de Esperanto en Antverpeno (1911) same taŭgajn vortojn:

Mi uzas ankaŭ la okazon de nia festo, por revoki en vian memoron la nomon de unu viro, kiu havas grandegan meriton en nia afero. La prelato Johann Martin Schleyer, kies nomon ĉiu el vi konas tre bone, la aŭtoro de Volapük, antaŭ nelonge festis la okdekjaran datrevenon de sia naskiĝo, kaj estus nepardoninde, se ni ne uzus la okazon de nia nuna ĝenerala kunestado, por esprimi al li tiujn sentojn, kiujn ni ĉiuj havas por li. Li estas la vera patro de la tuta internacilingva movado [...] [kaj] li estis la unua, kiu praktike kreis la internacilingvan *movadon*."

Sed Zamenhof rememorigis ankaŭ, ke "Volapük pereis ĉefe pro [...] *absoluta manko de natura evoluipovo*".

La sinteno de Schleyer

Do, oni povas konkludi kaj devas emfazi la diferencon, ke Zamenhof ja malaprobis unuflanke la lingvon Volapük, ĉar lingvistike ĝi estis fiasko, due ĝi kontribuis al la malbona reputacio de la mondlingva ideo ĝenerale kaj ŝajne bremsis ĝian movadon; aliflanke glorita estis ĝia inventinto Schleyer kiel grava figuro en la historio de la planlingva ideo, aŭ movado. En ambaŭ kazoj, la opinio de Zamenhof estis kvankam drasta sendube tute sincera kaj honesta.

Ŝajnas, ke Schleyer mem, ne libera de aroganteco, ne emis reciproke la afablecon kaj bonvolajn sentojn de Zamenhof, direktitajn al li. Konsiderante Esperanton lingvo de fuŝuloj kaj finkalkulante kun sia rivalo Zamenhof, Schleyer notis (germanlingve) la 8-X-1900 en sia taglibro jenajn sufiĉe malicajn frazojn:

Ĉiuj imitaĉadoj de Volapük malaperis preskaŭ ĉiuj de la bildosurfaco de la publika atentado kaj aplikado. Nur la Esperanto de sinjoro Z. fantomas kaj vegetas jen kaj jen en malklaraj kaj antaŭjuĝaj [germane: *befangenen*] kapoj. *Tedas* nin do senlime perdi ankoraŭ plurajn vortojn pri la Esperanto-miŝmaŝo [germane: *Kauderwelsch*; traduko de aK).

Nu, ŝajnas, ke oni povas komenti ĉi tiun negativan reagon flanke de la evidente ofendita Schleyer per la amara rimarko, ke ĝi estis iom maljusta, almenaŭ malafabla.

Konsultitaj fontoj:

[Заменгоф Л.] Др. Эсперанто. *Международный язык: Предисловие и полный учебник* (por Rusoj). Варшава, 1887.

La Esperantisto, 1889.

Iom reviziita plena verkaro de L. L. Zamenhof. 3 volumoj / [Komp. Itô Kanzi]. Kioto, 1989–1991.

Zamenhof L. L. *Originala verkaro* / Komp. J. Dietterle. Leipzig, 1929.

Hauptenthal R. *125 Jahre Volapük. Leben und Werk von Johann Martin Schleyer 1831-1912*. Schliengen, 2005.

250 jarojn antaŭe

Eseo de Sergio Pokrovskij

LA HISTORIA JARO

Iom multe da datrevenoj el la rusa historio okazas ĉi-jare. Pensante pri ili mi ĉiufoje rememoris la ŝercan “Historion de Rusio de Gostomislo ĝis Timaŝev” (1868) fare de Aleksio K. Tolstoj (pli aĝa malproksima parenco de la granda romanisto). Mi ne konas esperantigon de tiu amuza poemeto, kaj tial — kvankam mi ne estas versisto — mi tradukis kelkajn verskvarojn, rilatajn al miaj temoj:

“Nia lando estas granda kaj abunda,
sed en ĝi mankas ordo”.

*Komenca kroniko*¹,
la jaro 6370^a (862 p. K.)

1

*Aŭskultu, knaba bando,
resumon de l' konkord':
Abundas nia lando,
sed mankas en ĝi ord'.*

2

*En denso da nebuloj
de l' frua histori'
komprenis la prauloj
ke mankas ord' ĉe ni.*

3

*Decidis la civito:
“Ĉar mankas disciplin'
varegojn ni invitu
bonorde regi nin.*

4

*Ĝermanoj inĝenias
pri aĵoj de la mond';
kaj nia land' suferas,
ĉar en ĝi mankas ord'.”*

Nu, pri la varegoj mi verkos alifoje,
nun ni saltu en la 18-an jarcenton:

55

*De l' pinto de la grando
forŝiris Petron mort';
jen, plu abundas lando,
sed ree mankas ord'.*

56

*Diversa geularo
surtrone sekvis lin;
malofte estis caro,
sed ofte ja carin'.*

En la galanta 18^a jc Rusion plejparte
(dum 66 jaroj) regis imperiestrinoj:

Katarino la 1^a (2 jaroj, 1725–1727);
Anno (10 jaroj, 1730–1740), Elizabeto
(20 jaroj, 1741–1761), Katarino la 2^a
(34 jaroj, 1762–1796).

58

*Elizabet' la gaja
festenis sen enu',
amuz' multiĝis fraje,
sed ordo mankis plu.*

LA GAJA CARINO ELIZABET'



La gregoria jaro 1762^a komenciĝis
per la morto (je la 5^a de januaro) de car-
ino Elizabeto Petrovna.

Ŝia 20-jara regado havis sian gloron
— kaj militan (pri tio poste), kaj civilan.
Interalie, fondiĝis la Moskva universita-
to; aperis la definitiva slavona teksto de
Biblio (la Elizabetana Biblio), ĝis nun
uzata de la Rusa ortodoksa eklezio; ŝi
abolis la mortopunon.

Elizabeto estis konscia pri sia
respondeco koncerne la imperion, kaj
tial postulis, ke ĉiuj decidoj pri la ŝtata
regado ricevu ŝian aprobon; tamen ŝi
ankaŭ tre ŝatis siajn amuzojn, kaj ne
povis dediĉi al la ŝtatregado pli ol po 15
minutojn tage. Rezulte ŝiaj ministroj
facile persvadis ŝin pri necesaj aranĝoj,
krom en du aferoj: kiam temis pri
mortopuno (kion ŝi ĉiam rifuzis), aŭ pri
milito (pri kio ŝi postulis konvinkajn
argumentojn).

Samkiel Elizabeto de Anglio, ŝi

malvolis meti super sin monarkan
edzon, kaj ŝia geedziĝo kun Aleksio
Razumovskij restis sekreta. Konscia pri
siaj imperiestraj devoj, Elizabeto zorgis
doni al la trono heredonton, kaj venigis
el Holstinio sian 13-jaran nevon, nepon
de Petro la Granda.

PETRO KAJ KATARINO

Petro la 1^a volis ĉiel eŭropigi Rusion,
aranĝi la landon laŭ la germana maniero
— kaj liaj reformoj restis aktualaj dum
la tuta 18^a jc:

49

*Car' Petro ŝatis ordon,
samkiel car' Johan²;
malmildan havis moron
kaj estis li bakhan'.*

50

*Li diris: “Mi kompatas
la landon en malord';
sed mi al ĉiuj patras,
kaj skurĝos vin kun fort'.*

51

*La ordo estos ĉie
ĉe la novjaro jam'.
Por serĉi ordon iris
la car' al Amsterdam'.*

Ankaŭ sian familion li volis german-
igi, kaj la decido edzinigi sian filinon
Anno Petrovna al Karolo-Frederiko la
duko de Holstinio estis unu el liaj lastaj
faroj. La duko estis malbela, malsanema
kaj neinteligenta; duonon da liaj posed-
aĵoj tiutempe okupis Danio (tial li almo-
ze venis al la Peterburga kortego); tamen
li estis nevo de Karolo la 12^a de Svedio,
kaj eventuala heredonto de ties trono. La
bela Anno Petrovna forte rezistis, sed
devis cedi.

Je 1728-02-21 en Kilo (germane
Kiel) al la gedukoj naskiĝis filo, Karo-
lo-Petro-Ulriĥo, la onta Petro la 3^a;
Anno Petrovna mortis samjare, kaj 11
jarojn poste (1739) mortis la patro.
Venigite en Rusion, la orfa duko devis
konvertiĝi en ortodoksismon (kie li rete-
nis la baptonomon Petro), kaj en la jaro
1745^a Elizabeto edzigis lin al principino
Sophie Auguste Friederike von Anhalt-
Zerbst-Dornburg, kiu ĉe sia konvertiĝo
ricevis la ortodoksan baptonomon

Katarino. Pro sentimentala motivo Elizabeto volis ke la heredonta paro havu la samajn nomojn, kiel ŝiaj gepatroj: Petro kaj Katarino.

LA DUKO DE HOLSTINIO

Venigite en Rusion, Katarino tre diligente eklernis la rusajn lingvon, religion, historion, la rilatojn kaj morojn de la aristokrataj familioj. Ŝia fervoro por la nova patrujo kortuŝis la socion, kaj ŝi sukcesis esti akceptata kiel rusino.

Male, ŝia edzo por sia tuta vivo restis germana patrioto kaj duko de sia malgranda Holstinio. Li tamen volonte akceptus la svedian kronon, kiun de lia nomo Elizabeto rifuzis³.

Kaj kiel konvenis al germana junulo el protestanta familio, Petro idoligis Frederikon la Grandan de Prusio, kaj laŭte diskonigadis sian admiron. Li revis servi al Frederiko kiel simpla leŭtenanto. Li forte kontraŭstaris ĉiun decidon kontraŭrusian, kaj dum la Sepjara Milito Elizabeto devis ekŝigi lin el la Ŝtata Konsilio pro lia malkaŝa pozicio favora al la kontraŭulo.

LA SEPJARA MILITO (1756–1763)

La tutan finon de la regado de Elizabeto okupis la mondoskala Sepjara milito. Ĉi tie nin interesas nur ĝia orienteŭropa dimensio, sen la koloniaj bataloj inter Francio kaj Britio. Do, en Eŭropo,

- Aŭstrio volis repreni Silezion, kiun ĵuse (1740) aneksis Frederiko la 2^a de Prusio.
- Britio dungis Frederikon militi kontraŭ Francio, por ke Francio tenu siajn trupojn en Eŭropo dum Britio forprenas la francajn koloniojn en Ameriko (Kanadon, Luizianon), Hindio ktp.
- Frederiko volis okupi Saksonion por interŝanĝi ĝin kontraŭ Ĉeĥio, kaj vasaligi Pollandon.
- Francio militante kontraŭ Anglio okupis Hanovrion estkiel heredan posedaĵon de la britia reĝo Georgo la 2^a (ĝi do rilatis al Britio samkiel Holstinio al Rusio).
- Svedio volis akiri la prusian Pomerion.
- Rusio volis militakiri la Orientan Prusion kaj redoni ĝin al Pollando interŝanĝe kontraŭ ties etne parencaj ortodoksaj partoj (teritorioj de la iama Kieva Regno).

LA MIRAKLOJ DE LA BRANDENBURGA DOMO

La unua grava batalo rusa-prusa okazis je 1757-08-30 ĉe la vilaĝo *Granda Jegersdorfo* (germane *Groß-Jägersdorf*) en la Orienta Prusio. La rusa armeo venkas, tamen sian venkon ne profitas, kaj post ses tagoj komencas sin retiri, kvazaŭ post malvenko. La kaŭzo estas simpla: la rusa armeestro marŝalo Apraksin ricevis sciigon, ke Elizabeto estas mortonta; oni sciis pri la intencoj de la heredonto kaj antaŭtimis ties malfavoron.

Tiaj strangaj retiriĝoj post gajnita batalo ripetiĝis fojon post fojo; je 1759-08-12 la armeo de Frederiko estis neniigita en la batalo ĉe Kunersdorfo (nun la pola *Kunowice*); kiam la venkintoj ne profitis la venkon kiu jam tiam povis decidi pri la fino de la milito, Frederiko nomis tion en letero al sia frato *miraklo de la Brandenburga domo*.

(Sekvajare, je 1760-10-09 rusa taĉmento helpate de aŭstrianoj por kelkaj tagoj tamen okupas Berlinon; sed neniel provas ĝin reteni.)

Komence de la jaro 1762^a la situacio de Frederiko estis senespera. Komencinte la militon kun 250 mil homoj, Frederiko nun apenaŭ povis arigi 60 mil. Britio jam atingis siajn celojn, kaj rigardis la aferon de Frederiko perditaj; tial la britiajn subvenciojn la nova registaro decidis ĉesigi.

La morto de Elizabeto venis kiel “la dua miraklo de la Brandenburga domo”, tute eklipsante la unuan. Petro la 3^a tuj ĉesigis la militadon; li senkondiĉe redonis al Prusio ĉiujn aneksitajn teritoriojn (la Orienta Prusio jam kvar jarojn estis administrata kiel rusia provinco, ties enloĝantoj ĵuris ŝtataneccon de la imperio; neniu dubis, ke tio estas definitiva aranĝo, kaj la koncernaj instrukcioj de Frederiko al lia peterburga sendito temis nur pri eventuala kompenso al Frederiko je la kosto de Pollando — kiu lasta, cetero, neniel partoprenis en la milito).

Rompante la aliancon kun Aŭstrio, Petro faris kun Prusio kontrakton “pri paco kaj amikeco” en Peterburgo je 1762-05-15.

Nun Petro volis servi Frederikon kiel holstinia kolonelo (ioma promocio kompare kun la antaŭa “leŭtenanto”), kaj komencis prepari trupojn por kunaj operacioj en Germanio. Vane Frederiko insistis, ke Petro unue lasu sin kroni kiel imperiestro de Rusio (ial Frederiko pli aprezis aliancon kun la imperiestro de



Petro III regis Ruslandon dum 186 tagoj, sed ne estis dumvive kronita kiel Imperiestro.

Rusio ol kun la duko de Holstinio); Petro la 3^a mortis ne surmetinte la rusian kronon.

Je la 19^a de junio Rusio kaj Prusio kontraktis pri milita alianco: Rusio estis disponigonta siajn trupojn por milito kontraŭ siaj hieraŭaj aliancanoj.

Monaton poste, post la ŝtatrenverso, Katarino rompos la kontrakton pri alianco, sed lasos valida la packontrakton. Rusio ne plu partoprenos ĉi tiun por ĝi senutilan militon. Tamen la mallonga regado de Petro la 3^a sufiĉis por savi Prusion:

Tiun militon partoprenis homoj lertaj, homoj inĝeniaj, homoj prudentaj — kaj unu frenezulo. Kaj la frenezulo gajnis danke al “ĝia sankta moŝto la Hazardo”, kiel li mem volonte diradis. Tiun “Hazardon” helpis lia talento militestra, lia kuraĝo, kaj la angla oro, sen kiu maleblus la duelo de lia malgranda lando kontraŭ la tuta kontinenta Eŭropo. Sed se Elizabeto estus vivinta ankoraŭ kelkajn monatojn, la dinastio Hohencolerna pereus...⁴

Resume, la dispartigo de Prusio fiaskis, Prusio plifirmigis sian pozicion kaj povis partopreni en la anstataŭaj dispartigoj de Pollando.

LA LIBEROJ DE LA RUSIA NOBELARO

La leĝofara agado de Petro la 3^a estis eksterordinara. Dum la 186 tagoj de sia regado li postlasis 192 diverstemajn, sed plejparte tre utilajn, aktojn registritajn en la *Plena leĝaro de la Ruslanda Imperio* (sen nombri la privatajn ordonojn pri promocioj, rekompencoj ktp).

Petro ĉesigis persekuton de la malnovritanoj kaj de ceteraj alikonfesianoj; liberigis la eksteran komercon; fondis la unuan Ŝtatan bankon; enkondukis eternan ekzilon kiel punon al bienulo mortiginta sian servutulon. Alŝtatiginte la ekleziajn bienojn, li liberigis ties servutulojn.

Li establis psiĥiatrian servon por la frenezuloj (antaŭe tio estis zorgo de la monaĥejoj) kaj muzikan lernejon por popoloj.

Tamen lia plej grava akto estis la “Manifesto pri la libero de la nobelaro” (18/29 feb 1762).

En sia lukto kontraŭ la tradicia aristokrataro Petro la 1^a sin apogis sur la ŝtatservistojn (la oficiroj kaj burokratoj), el kiuj li volis fari ion similan al la okcidenta nobelaro, tamen pli meritokratan. Tiuj ŝtatservistoj ricevis do bienojn pro kaj por sia dumviva servo al la ŝtato.

Sub imperiestrino Anno la nobelaj ricevis la rajton forlasi la ŝtatservon (konservante la bienojn) post 25 jaroj da ŝtatservado. Nun Petro la 3^a tute abolis la devigan ŝtatservon por la nobelaj.

La Manifesto de la 18^a de februaro, abolante la devigan servon por la nobelaro, nenion diras pri la nobela rajto je servuto, kies fonto estas la ŝtatservado. Laŭ la historia logiko kaj socia justico je la sekva tago, la 19-an de februaro, devus sekvi abolo de la servutismo; kaj efektive ĝi okazis je la 19^a de februaro, tamen 99 jarojn poste.

[Kluĉevskij: *Kurso pri la rusia historio*. Prelego 72^a]

Ĉi tiun logikon Petro la 3^a ne komprenis. Li simple volis fari nobelaron same parazita klaso, kiel en la Okcidento. Sed iuj kamparanoj ja tiun

konkludon tiris, kaj okazis kelkaj ribeloj. Per speciala manifesto (19^a jun.) Petro konfirmis netuŝeblon de la nobelbiena servutismo.

Tamen ĉiuj postaj uzurpuloj de lia nomo (ankaŭ la plej fama, Pugaĉov) proklamis tiun abolon de servutismo.

LA ŜTATRENVERSO KAJ MORTO

Malgraŭ siaj eksterdubaj heredaj rajtoj, diligento kaj multaj prudentaj ediktoj Petro la 3^a malhavis firman apogon en la socio. La ŝokan pacon kun Prusio, kiu vanigis ĉiujn oferojn de la longa milito, akompanis pluaj stultajtoj: la onta milito kontraŭ la hieraŭaj aliancanoj, la prusia uniformo trudita al la armeo (surmeti la uniformon de la multfoje venkita malamiko aspektis kiel insulta moko).

Petro malfidis la rusojn, kaj precipe (kaj tute prave) la gvardion, kiun li volis anstataŭigi per nova gvardio holstinia; al la gvardio certe malplaĉis tiaj intencoj.

La familia vivo de Petro kaj Katarino ne estis sukcesa. Ambaŭ geedzoj havis siajn amaferojn eksterfamiliajn, kaj Petro konsideris divorcon. Katarino estis ŝatata en la gvardio, kaj profitis lian foreston el Peterburgo je la nomfesto de Petro (28 jun / 9 jul) por aranĝi ŝtatrenverŝon.

Neniu volis subteni Petron krom liaj holstinianoj; tamen Petro malvolis rezisti kaj abdiki kondiĉe ke li povos reveni en sian Holstinion. Pri tio Katarino lin trompis: Petro iĝis arestita kaj post 8 tagoj li mortis ĉe tre suspektindaj cirkonstancoj. Komenciĝis la brila regado de Katarino la Granda, “la orepoko de la rusa nobelaro”.

KONRADO VALENRODO SUR LA RUSIA TRONO

Ŝajnas al mi, ke Petro la 3^a pli meritatas atenton de romantikisma poeto ol Konrado Valenrodo, pri kiu Mickeviĉo verkis romantikan poemon (1828). Unue, ĉar la historio de Petro estas reala, dum la versio de Mickeviĉo estas elpens-aĵo. Kaj due, ĉar Petro neniam sin makulis per fia trompo, li ĉiam malkaŝe deklaris sian admiron pri Frederiko la Granda kaj sian germanan patriotismon.

La grava diferenco tamen konsistas en tio, ke la perfido de Konrado estis kontraŭgermana, dum Petro perfidis la imperion pro Germanio (kaj sia Holstinio). Tio apenaŭ povus inspiri polan poeton.

Petro la 3^a multrilate similis sian patron (malbela, malsanema, neinteligenta); tamen li certe estas figuro romantika kaj eĉ tragika. Tiurilate lin similis lia filo Paŭlo, kiun Puŝkino nomis “la plej romantika el niaj imperiestroj”.

NOTOJ

1. La *Komenca kroniko* (Ruse: *Начальная летопись* aŭ *Повесть временных лет*) estas la plej antikva kroniko de la Kieva Regno.

2. Aludo pri Johano la 4^a (1530–1584):

30

*Johano la Timinda —
jam klaras el la nom',
ke estis li solida
kaj serioza hom'.*

31

*Ne per afablaj vortoj,
ne sen inteligent'
li tian kreis ordon —
nu kiel en dezert'!*

3. Lia sveda avino edziniĝis al la duko de Holstinio sen sankcio de la parlamento, kaj tial estis senigita je la hereda rajto. Tamen ĉe la fino de la svedarusa milito, la venkita Svedio esperis mildigi la packondiĉojn proklamante Petron-Ulriĥon heredonto de la sveda trono. La parlamento tiam ne sciis, ke Elizabeto decidis rezervi la nevon por Rusio; rezulte la svedan kronon ricevis Adolfo-Frederiko, la onklo de Petro. Ĉiel ajn, nur per Rusio Petro povus ricevi la svedan kronon.

4. Waliszewski K. *La Dernière des Romanov, Élisabeth I*, 1902. Ĉap. 3^a.



Kion fari, Zam? Ram pam pam!

Eterne Rima. *Samideano*: KD. —
Donneville: Vinilkosmo, 2010.

Preinte la diskon *Samideano* de *Eterne Rima* kun 18 mezlongaj kanzonoj, kun prologo kaj epilogo, mi alvizaĝis defian taskon priopinii tion, kio por mi plejparte ne ekzistis dum mia vivo — la hiphop-kulturon kaj ties “muzikon”, ankaŭ nomatan “repo”. Min apenaŭ interesis tio, kio ne estas vera kanto, kiam oni uzas almenaŭ iun melodion voĉe. Do strikte dirante, mi ne opinias tion vera “muziko”.

La historio de ritma recitado iras profundege en la pasinton, sed en nia kazo temas pri tute konkreta stilo komerca kiu “vendiĝas”. Laŭ iuj teorioj, estis speciala sekreta programo ensociigi krimecan konduton per tia muziko kaj rilataj kulturaĵoj, cele pliajn profitojn de la investintoj en privatajn prizonojn en Usono. Sed tio estas alia historio.

La akompana libreto (tradicie bele eldonita de *Vinilkosmo*) informas, ke sub ĉi bela nomo figuras “fervora muzikisto, repulo kaj kantisto” Igor Wasilewski, naskita en Polujo kaj vivanta en Japanio. Li kontribuis al aliaj albumoj, inter ili *Elektronika Kompilo*, ĝis li revenis al hiphopo novskolmuzike oscilanta inter *Dirty South*, *Crunk*, *R&B* kaj kalifornia stilo. Skrupulemoj povas facile esplori pri kio temas. Li mem komponas la muzikon, verkas tekstojn kaj faras produktadon.

Evidente la pleja pezo enhava kuŝas sur la tekstoj, ĉar pri la “muziko” mi diru nur, ke jes ĝi similas, identas kun la nun havebla fluo da tia materialo. Mi eble ne kompetentas pri la profundaj nuancoj karakterizaj pri ĉi stilo, sed mie preskaŭ ĉiuj eroj sonas simile inter si. Ankaŭ sur pluraj paĝoj de la broŝuro aperas similaj fotoĵoj de Igor kun senŝanĝa mieno, tamen kun variaj fonoj kaj vestaĵoj.

Ni atentu la tekstojn. Aparte intrigas “gepatra averto” pri “ofenda enhavo” “al tro sensitivaj delikatuloj”. Nu, ja tio estas integra parto de la kulturo, ĉu ne...

Unue notindas, ke la repulo havas brile senriproĉan prononcon — la diskon eblas kaj indas uzi kiel modelon instrue (ankaŭ por trejni la riĉan leksikon, sed singardeme pri eble tro frue uzitaj neologismoj: ekspekti, bizneso, pelmelo...). La rimoj en la tekstoj estas ĝenerale trafaj — ĉu tion faciligas la naturo de la repo, ne postulanta striktajn *ritmajn* limigojn, do ebligante pli da manovro? Ankaŭ gramatike ĉio estas

ĝuinda, kvankam iam la definitiva artikolo “la” mankas aŭ misas.

La plenumanto nomas sin “rep-majstro” kiu faras “espo-repon en tiu stranga lingvo”, ke ni ne povas ne konkludi ke per repo “kreiĝu nova historio” kaj la merito de Igor estas, ke li uzas ĉi stilon por la Esperanta publiko. Kial ne? Ankoraŭ unu ilo por fiere fanfaroni, ke ankaŭ en nia kara lingvo eblas tiom digne repi.



Pri kio repas la repulo? Nu, pri sia loko en la vivo (*Reĝo strata*) — kun videbla emo al megalomanio; pri penoj sin identigi en la spaco kaj tempo (“kreiĝas nova historio”). Ĉu la naiva sklavoj tra sia ĉiutageco atingos sian celon? Pri penoj kompreni, kion li signifas por si kaj sia kara virino. En la albumsamtitola peco *Samideano* staras demandoj “Ĉu vi atendas ĝis la fina venko?” — “Mi ne batalas, [la] mondon ne ŝanĝas, ĉar ne eblas... tio ja komprenblas...” — jam filozofio kompleta. Dialogante kun sia alia egoo pri certaj fundamentaj ideoj rilataj al Esperanto, la repulo tamen ne venas al respondo je “Kion signifas la familia rondo?”

Kiel kompreni la fanfaronajn “mi havas stilon [...], sur mi arĝenta ĉen” — ĉu narcisisme kaj ke tio estas delikata satiro? En *Jam ne plu estas mok’* ni aŭdas “Ni estas frenezuloj / vi estas la saĝul’ / aŭskultu min kacul’...” Mi komprenas ke uzi “fortajn” fek-vortojn plifaciligas la liveron de la mesaĝo (laŭ Ivan Jefremov, en socioj kun plia akumulita malico), sed kiel normala homo mi apenaŭ akceptos iam ĉi rektan insulton kontraŭ mi.

Videble nia heroo serĉas, kio absolute salutindas — “ion eksteran” (ĉu la interna ideo ie sin kaŝas), “alian frekvencon”, “la veran potencon”... Ĉu ni do ricevas novan manieron varbi anojn en nian Esperanto-parolantan komunumon per freŝaj metodoj kiel primoko kaj belaj

frazoj kiel “manĝu merdon, stultul’... kacul’”? Tra agreso — al adoro de nova idolo iva je esprimo! Jo! Mi penis imagi min fandiĝi kun la agresema raŭkvoĉa filingvaĵa protagonisto, eĉ por medicina celo esplora... Ne, mi ne sukcesis.

Promesita al mono — ĉu satiro aŭ himno, se li klare stampas ke “per mono ĉion [li] ricevos”? En *Ne kalkulu* ni aŭdas “faru nenion, ĉar morgaŭ la aferoj iros kontraŭ vi... [la] vivon kaptu, ĉar vi perdiĝas” — eble plej ŝatebla peco, pro la klare sentebla kaj sukcesa provo prezenti unuecan koncepton, des pli ke prezentatas la plej komprenebla konkludo de ĉio — “sub tero kuŝos vi”. Sincera alvoko esti pasiva. Nu, ni ja scias/komprenas ke tio estas nur satiro, provoko. Aŭ... primoko de... mi... ĉiuj... pri kio?... Mi konfuziĝas.

Plue, mi apenaŭ trovas vere aliajn temojn. Nu, en *Oro kaj poluro*, denove, sklavecaj revoj kaj disŝiroj inter emoj al oro kaj ceteraj luksaĵoj, unuflanke, kaj la fantoma realaĵo ke ĉi mondo svarmas je parazitaj, aliflanke. Ĉu esti barono kaj konsenti ĝui la belaĵojn, droni en luksaĵoj, aŭ sin venkitigi al jam kiomfoja ŝpruco elinterna de mortigema humoro? Kien fuĝi?

Ankaŭ pri amo temas en *Ŝia ĉiel’* — tre konvinka kanzono pri la eterna ideo, ke tamen ne eblas kaj ne endas aĉeti la amon. Kaj en alia priama peco, freŝe kun rokaj ecoj (*Rokulino*) ni sekvas historion de despera amo al rokulino, kiu ve ne ŝatas repon — abismeniga antagonismo. Mi preskaŭ ploris. Igor, forĵetu tiun dinosaŭrinon, ja la roko estas morta kaj historio!

Kaj albumfine nia heroo penas esplori motivojn, kialojn por ke oni povu sin okupi pri “espo” kaj kialojn de ties malsukcesoj (*Vera senc’*) kaj rekte konsultas nian Majstron (*Zam*) pri kion tamen fari nun, ĉar li estas “lasta instanco, unusola ŝanco” pri ĉu dormi aŭ ne dormi kun virino ktp. La ideo estas vere iom tro ekzotika, se temas pri Zamenhof, sed arto estas arto... Kaj la bildo de Z. estas ĉarma, kvankam li respondas eterne rime nur per “ram pam pam”. La *Epilogo* glorigas la “du literojn”, E kaj R, do la aŭtoron mem.

Konklude: megalomanieca enhavo kun neniuj novaj aŭ freŝaj ideoj, griza “muziko” por specifaj emuloj, bela elparolo, iom da insulta agreso kaj neresponditaj demandoj, perfekta produktado kaj eldono. Ĉu mi interesiĝos pri pluj eldonoj?

Andrej Peĉonkin

Lajos Tárkony

Ekzistas genio kiu verkas abunde kaj fekunde, preskaŭ nebareble — sed koste de kvalita malegaleco. Alia genio malofte inspiriĝas, kreas pene, dubeme — sed naskante, kiel perlo, gemojn. Kalocsay kaj Baghy apartenis al la unua tipo, dum Lajos Tárkony al la dua speco.

54 jaroj da verke aktiva esperantisteco postlasis nur du kompletajn, memstarajn Tárkony-volumojn: la kritikan esearon *De paĝo al paĝo* (1932, 1976) kaj poemaron kun praktike lia tuta poezia verkaro: *Sojfo* (1964). Maljuste reduktas la signifon de Tárkony lia nesintruda personeco, nemontriĝemo: *pri* li oni apenaŭ skribas en *Literatura Mondo*, dum Baghy kaj Kalocsay centras en disputoj kaj en la publika atento. Ĉu atribui al ĉi modesta retiriĝemo la dufoje ŝanĝon de (verkista) nomo? Denaske Lajos Totsche, li ekverkis kiel Lali Blond, kaj postmilite iĝis Lajos Tárkony.

Tárkony ĉiam restis fidela samtempe al unu periodaĵo: ĝis 1949 al *Literatura Mondo*, kaj ekde 1961 al *Hungara Vivo*. La vera altira forto instiga restis por li ĝisfine la kvazaŭpatro Kalocsay:

*Vi, KALOCSAY, puŝis mian plumon,
al vi mi dankdediĉas ĉi volumon,
kiel la Tero siajn fruktojn donas,
dankante maturiĝan sunolumon.*

Pri Tárkony malmulton konkretan ni scias, antaŭ ĉio el intervjuo de Vilmos Benczik (*Hungara Vivo*, 1975, №6, p. 1-2): “Kompreneble mi naskiĝis (Budapest, 1902), havis kvin fratojn, post la abiturienta ekzameno fariĝis studento de jurscienco, sed pro malsano mi devis ĉesigi la universitatajn studojn. Poste mi oficistis ĝis mia pensiĝo.”

Esperanton li ekkonis printempe de 1919, per sessemajna kurso, en sia piarista gimnazio. El lia verkaro malmulto konkludeblas pri lia vivo: frua morto de la patrino lasis vundon sen-cikatan; gimnazio estis ŝirma nesto; sekvis vivo kun griza, ĉiutaga ofica devo. Multa malsano, certe jam junaĝe. La mondmilito, en kiu li supozeble ne soldatas, teruras lin, antaŭsentinton. Poste, politike sen engaĝo, li tamen entuziasmas en la ĝoja etoso de liberiĝo (“La unua de majo”) — kvankam, eble, li intencis nur eksperimenti per pli libera versformo... Post la Granda Fasto de la 50-aj, liaj ĉeftemoj fariĝas memoroj pri



Lajos Tárkony (1902–1978)

la plibeliĝinta juneco kaj la homa pase-mo ĝenerale.

Se elekti unu poemon de Tárkony, tiu sendube estu *Adiaŭo*, proponenda inter la dek plej belajn poemojn en Esperanto.

Adiaŭo

*Tagmez'. Somera ard'. Soleca benko
ĉe pinarbara rando. Post du horoj
ekiros mia vagonar'. Silento.
Langvore revas en la varm' la floroj.
Inter ni ŝvebas ia festa sento
pri adiaŭ', disigaj vojoj, foroj.*

*Kaj nun, lasthore, la unuan fojon
por kis' amika lipojn vi proponas,
kaj tutan mian solon kaj malĝojon
en ununuran kison mi ordonas.
Unua, lasta via kis': sur vojon
kiel donacon dolĉan vi ĝin donas.*

*Kaj post la kiso, jen rigardo hasta
al la kolormagi' de via juno.
Ho, ĉi rigardo lasta, trista, ĉasta,
ho, kurta hor' de ĉi pasema kuno:
en koron tranĉas kun impeto drasta
l' efemerec' de ĉia homa nuno.*

*L' arbar' postenas post ni kaj ĝin mute
la sun' surŝutas per radiogarboj.
Mi tenas vian manon, lante tute
enretas nin la bunte brilaj farboj,
kaj, kiuj foje en ĉerkformo glute
nin manĝos, ie staras jam la arboj.*

La poemo belas pro rigoraj formo kaj komponiteco: jen puraj trimoj (krom en la unua strofo: “benko — silento — sento”), jen la fabele bela “Langvore revas en la varm' la floroj”, en kiu oni unue perceptas la petolan ludon de konsonantoj v-r, r-v, v-r kaj de kvarfoja l, trifoje pied-lanĉa por fine atingi akcentan silabon; poste klariĝas

la eĉ pli delikata ludo de vokaloj: dum mankas la tro alta “i” kaj la tro malalta “u”, la restantaj tri vokaloj fajne harmonias (a-o-e // e-a // e-a // a-a // o-o): post “montriĝo” de ĉiu el ili, dufojan divers-tonan (e-a) vokon prirespondas dufoje unutona paro, tamen ne monotona.

La unua strofo majstre koncizas: tri versoj skizas, peniktuŝe, la tempon absolutan (“Tagmez'. Somera...”) kaj relativan (“Post du horoj ekiros mia vagonar’”), la lokon (“Soleca benko ĉe pinarbara rando”), la etoson (“ard’”, “Silento”). Post la kvara verso (konkura kun la *Unuversaj unuversoj* de Waringhien), kiu pentras fonen la naturon, ape-ras en la kvina tiu “ni”, pri kiuj la poemo temas; kaj fine, antaŭkonjekteble kaj konklude, ni venas al ilia animstato, al tiu “festa sento pri adiaŭ’ ”.

Jen en la dua strofo io “okazas”; la paradokse lasta kaj unua kiso. La impreson de paradokso fortigas kiasma ripeto 1.: “_last_hore, la _unua_n fojon...” kaj 5.: “_Unua_, _lasta_ via kis’”.

Triastrofe, la individuan sperton vastigas al ĝenerale homa konkludo la versoj 5-6. La triston de la adiaŭo, konforme al la enhavo, akriĝas la fonetika dureco de versoj 4 kaj ĉefe 5: “ho kurta hor’ de ĉi pasema kuno: / en koron tranĉas kun impeto drasta...”

La kvara strofo teme revenas al la unua, sed ĝi montras ciklecon, refermiĝon sur du niveloj; krom repentri la arbaron de la unua strofo, ĝi mem komenciĝas kaj finiĝas per “arbar’”, “arboj”, daŭraj gardantoj de la paro: envive ili postenas starante, enmorte ili “glute nin manĝos”. Senteblas pli rezignacio je la komuna homa fino ol ribelo kontraŭ ĝi. Se ni ne konus Tárkony, eble surprizus nin la poemfino, ne strikte ligita al la ama temo, sed fakte, krom la arbo-motivo ĝin pravigas la melankolia tono, kies kutima eliro ĉe Tárkony estas la morto-penso.

Tárkony kiel originala poeto karakteriziĝas per ĉie-ŝveba melankolio: tristo, kiu fontas esence el sia soleca karaktero, introvertemo. Tria plej grava figuro de la budapeŝta skolo, Tárkony estis unu el la plej signifaj Esperanto-poetoj, kies unuvoluma viv-verkaro aparte elstaras per sia riĉo kaj strukturo. Kiel tradukanto li riĉiĝis kaj la tradukitan Esperanto-literaturon kaj — pli grave — evoluigis sian propran poezian lingvon. Kiel kritikisto li produktis relative malmulte, sed lia rolo estis pionira sur tiu tereno.

István Ertl



Literatura konkurso Liro-2012

Post unujara paŭzo (2011) *La Ondo de Esperanto* denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la tradicia literatura konkurso *Liro*. Ĉi-jare estas proponitaj du originalaj kaj du tradukaj branĉoj:

1. Originala prozo
2. Originala poezio
3. Traduko el la angla: *The man who would manage* de Jerome K. Jerome
4. Traduko el la rusa: *Beglec* de Anton Ĉeĥov.

En la originalaj branĉoj (1, 2) oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj, en la tradukaj branĉoj (3, 4) — nur per unu verko.

La originaloj de la tradukendaj tekstoj estas elŝuteblaj en la retejo de *La Ondo de Esperanto*: <http://www.esperanto.org/Ondo/Ind-liro.htm>

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 1a de decembro 2012.

Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso sezonoj@yahoo.com. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La organizanto ĝis la 1a de januaro 2015 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto* kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono.

Bonsancon!

Halina Gorecka
sekretario de *Liro*

Ricevitaj libroj

Amo al bono, vero, belo: Rekolekto por junularo / Tradukis el la pola Stanisław Płachta. — Pilica-Biskupice: [Stanisław Płachta], 2012. — 59 p. — [Donaco de Stanisław Płachta].

Gudskov, Nikolao. *Kiel la homo ekis pensi*: Eseoj pri la helena filozofio. — M.: Impeto, 2012. — 288 p.; 300 ekz. — [Aĉeto].

Ionesco, Eugène. *La leciono*: Komika dramo / Tradukis el la franca Armela LeQuint, Ĵak Le Puil. — Thaumiers: La KancerKliniko, [2010]. — 40 p. — [Recenzoekzemplero].

Neves, Gonçalo. *Zamenhof kaj Volapük*. — Bad Bellingen: Edition Iltis, 2012. — 44 p. — [Donaco de Reinhard Haupenthal].

Sudermann, Hermann. *La ekskurso al Tilsit*: Litova rakonto / Tradukis el la germana, enkondukis Reinhard Haupenthal. — Bad Bellingen: Edition Iltis, 2012. — 44 p. — [Donaco de Reinhard Haupenthal].

Nomen est omen: Сб. статей к 60-летию Никола Борисовича Вахтина (от непослушных учеников). — СПб.: Издательство Европейского Университета в Санкт-Петербурге, 2010. — 334 с., илл.; 300 экз. — (Studia Ethnologica; Вып. 7). — [Donaco de Antolij Sidorov].

C. 51-72. Буркина О. *Выдуманный язык и его невыдуманные носители*.

Ricevitaj gazetoj

Esperanto en Azio, 2012/75; Esperanto en Danio, 2012/2; Esperanto, 2012/5,6; Frateco, 2012/96; Kontakto, 2012/2; La Gazeto, 2012/159,160; La Lanterno Azia, 2012/5; La Ondo de Esperanto, 2012/6; La Revuo Orienta, 2012/5; Le Monde de l'Espéranto, 2012/581; Literatura Foiro, 2012/256; Monato, 2012/5,6; Norvega Esperantisto, 2012/3; Scienco kaj Kulturo, 2012/2; Tempo, 2012/114; Verda Saksofono, 2012/31.

Literatura Foiro, 2012, №256

Originala literaturo: Lina Gabrielli kun poemo uverture kaj István Nemere per rakonto, kiu ligas la ĉi-jaran sinkon de *Costa Concordia* kun tiu de *Titanic* precize antaŭ cent jaroj. “Pasis la temp’... kaj finiĝis danco”: Carlo Minnaja omaĝas la ĵus forpasintan poëtinon Eli Urbanová. Zlatoje Martinov recenzas la poemaron *Epizodoj* de Lode Van de Velde, kandidatan por La Verko de la Jaro 2011.

Manuskripto el la redakcia arkivo: Kurisu Kei pri tradukoj de *Milito kontraŭ Salamandroj* de Karel Čapek. Ŝekspiro, ĉu katolika?: respondo al tiu versio serĉas Armando Zecchin. Carmel Mallia artikolas pri “alias” en la lingvistika rubriko, kun ligo al la aŭtoro de la unua esperanta literaturaĵo en Malto, la poemo *Penso Printempa*, kiun Dun Karm verkis jam en aprilo 1901.

La sepa arto kun Giorgio Silfer en la aprila numero, pri la plurfoje oskarumita *La artisto*. Teatro: *Anĝelo*, dramo de Jordan Slavejkov. Muziko: la partituro de *Kiel aromas nia Terglobo* (teksto de Elena Popova, komponis Aleksandar Stojĉev) kaj recenzo de Keranka Apostolova pri la kompakta disko *Brassens plu* de Jacques Yvart.

Zamenhof, Eŭropo kaj Jugoslavio: Francisko Degoul komentarias la bildojn metitajn de la redakcio al la artikolo en LF 254. Kaj artikoleto pri la printempa Ĉaŭdefono, kie ĵus okazis Studaj Tagoj pri Edmond Privat.

En 2012 la plenkoloraj kovropaĝoj de *Literatura Foiro*, sub la grafika zorgo de Gábor Déak, prezentas agrogramojn.

La revuon *Literatura Foiro* posedas, eldonas kaj administras LF-koop. Ĉefredaktoro: Ljubomir Trifonĉovski.

HeKo

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

**Sendependa internacia
revuo en Esperanto kun
legantoj en 65 landoj!**

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

En la junia *Ondo* ni aperigis la solvon kaj la liston de la dek solvintoj de la aprila *Sudoku*. Pro la ŝanĝita aper-ritmo de *La Ondo*, kaŭzita de la preskaŭ unumonata restado de la eldonanto kaj redaktoro en sanatorio, ni aperigis la rezulton antaŭ la limdato, ĝis kiu dum nia foresto venis tri pliaj ĝustaj respondoj.

Ilin sendis Malcolm Jones (Britio), Edith Schönwälder (Hispanio), Hanna Skalska (Pollando).

La loto donis krompremion al **Edith Schönwälder**, kiun ni kore gratulas.

Sudoku

Sudoku estas japana enigmo populara en la tuta mondo. Necesas plenigi la kampojn per ciferoj de 1 ĝis 9 tiel, ke en ĉiu horizontala kaj vertikala linio kaj en la kvadratoj 3×3 la ciferoj ne ripetiĝo. Viaj respondoj venu al la redakcio antaŭ la 10a de oktobro 2012.

Komputile kompilis **Aleksej Korŝenkov**

				8				
3								5
7			6	4	2			3
		5					1	
4	7						3	8
		6					4	
8			4	9	6			2
2								6
				7				

Disvastigu ĉiam!

“Disvastigu ĉiam!”, — estas la devizo de la Esperanto-propagandistoj en la bela brazila urbo Rio-de-Ĵaneiro, kiuj uzas eĉ la plej etajn eblojn por publike informi pri nia kara lingvo: en futbala stadiono, sur trotuaro, ĉe gazetbutiko, amaskunvenoj, kultura evento, ktp. En Rio eĉ dancistinoj volontas pozas kun la Verda Standardo.

Evandro Caboclo



Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Sur bazo ĵetita dubindas konstruo

Zamenhof ĵetis la bazon por tio kio esperanto estas hodiaŭ. (*Interlingvistika konferenco en Estonio* // HeKo 510 3-B, 24 jun 2012, esperantio.net/index.php?id=1972)

Ĉiu brusto kun sia gusto

Ĉe la brusto infangrupo prezentis en esperanto tri mallongajn fabelojn. (Anna Bartek. *Memortago pri Kolomano Kalocsay* // HeKo 492 7-A, 8 okt 2011, esperantio.net/index.php?id=1812)

Civito: Nek viando, nek fiŝo

Giorgio Silfer alvenis al nia sidejo pli mapli je la sesa vespere kaj antaŭ la prelego ni iom interparolis pri <...> la ideo de fileo <...> Post la interparolo <...> iĝis klare ke la Esperanta Civito ne direktiĝas al fileiĝo. (Manuel Ortega. *Indianoj pri Civitanoj, kaj respektive* // HeKo 442 6-C, 26 jun 2010, esperantio.net/index.php?id=1349)

Ingojn aŭguris Daŝdupto en urlo

<http://www.liberafolio.org/2011/ingaugura-parolado-de-probal-dasdupa-en-kopenhago>

Ne kokeriku

Traduki vian kaj mian kaj alies intuicion en kokretajn varbomanierojn estus bela projekto. (Dennis Keefe, 10 apr 2012, komente al sia artikolo *Teorio de disvastiĝo de novaĵoj, aplikata al Esperanto*, sezonoj.ru/2012/03/210keef; rimarkis Lu Wunsch)

Mono eksterrele

... fine de 2011 multaj kontribuintoj jam nerveze ekdemandadis, ĉu la mono malaperis senŝpure. (Liberafolio.org/2012/reta-piv-fine-aperos; rimarkis Ionel Oneț)

Komplika Cicerono, aŭ: Kiu demandas, tiu ne eraras

Por subteni mian aserton mi uzis retorikan demandon: “Ĉu iu inter la ĉeestantoj scias pri tio, ke la Eŭropa Esperantomovado okupiĝas pri uniaj temoj aŭ ne, kaj se jes, pri kiuj, kiel?”. (László Gados. *Esperanto prezentita al hungara Platformo por Eŭropa Integriĝo* // *Eŭropa Bulteno*, 2012, №115, p. 7)

Blasfembirdo

ibis/o [...] sakra ~o. Sp. de ~o (*Treskiornis aethiopicus*) blanka k nigra, kun senplumaj nigraj kapo k kolo, rigardita de la antikvaj egiptoj kiel sankta. (NPIV, p. 457, rimarkita de John Wells 21 sep 2009 en vortaro-blogo.blogspot.com)

Ili partoprenintis

Vlaho Bukovac [...] pentris la solenan kurtenon por Kroata nacia teatro sub la nomo “Nacia renaskiĝo”, kie estis prezentitaj la plej elstaraj partoprenintoj de tiu movado. (Radenko Milošević. *Tratempa vojaĝo al la jaro 1908* // *Zagreba Esperantisto*, 2007, №1, p. 6)

Plukis **István Ertl**

SES 2012

Somera Esperanto-Studado

21.-29.07.2012, Nitra, Slovakio

Kvina renkontiĝo de lernu! uzantoj

Kio atendas vin?:

elstaraj instruistoj, agrabla loko, bonega etoso, ekskursoj, sportumado, naĝado, koncertoj, prelegoj, diskutoj, filmoj, vin-gustumado...


Specialaj ĉi-fojaj programoj:

ILEI+E@I seminario „Flugiloj de malfacila vento“
Konkursoj kun valoraj premioj, KER-ekzamenoj

Pli da informoj: www.lernu.net/ses aŭ ses@lernu.net



SES somere kaj ARKONES aŭtune
La Ondo de Esperanto
rekomendas partopreni.



21-23.09.12
ARKONES
POZNAŃ



Ruslando. La urala urbo Jekaterinburg, kiu inter la 29 urb(et)oj gastigis la mondan KER-ekzamensesion, iĝis la urbo kun la plej amasa ekzameno en Azio. 21 kandidatoj venis ekzameniĝi al la regiona biblioteko Belinskij, kun kiu esperantistoj kunlaboras pli ol 30 jarojn. (*Aleksandr Osincev / Foto de la biblioteko*)




Belgio. Esperantistajn kongresojn kaj festkunvenojn volonte vizitas parlamentanoj, urbestroj kaj aliaj gravuloj por festparoli kaj gratuli. Sed la 12an de majo al la Bruĝa klubo *Paco kaj Justeco* (vd. p. 9) venis Zamenhof (tre simila al Ivo Durwael) por gratuli la grupon okaze de ĝia 75-jariĝo. (*Heidi Goes*)



Aŭstralio. Dum la longa semajnfino la 9-10-11-an de junio la Adelajdaj esperantistoj partoprenis la 4an Sudaŭstralian Vintran Kursaron kun trinivela instruado, prelegoj, fabeloj, primovada diskuto, kantado. Sur la foto: Max Wearing kaj Alan Bishop solvas vortenigmojn. (*Katja Steele*)




Fjodor Dostojevskij.
Blankaj noktoj: Ses prozaĵoj.
448 paĝoj, € 30,0.



Anton Ĉeĥov.
Ĉeriza ĝardeno: Noveloj, dramoj.
352 paĝoj, € 27,0.



Rusa Novelaro. Volumo 1
La 19a Jarcento.
400 paĝoj, € 30,0.




Samideanoj: Satori kaj humuraĵoj
pri Esperanto kaj pri esperantistoj.
80 paĝoj, € 7,5.



Georges Simenon.
Amiko el la junaĝo de Maigret.
128 paĝoj, € 12,0.




Trevor Steele.
Diverskoloro: Originalaj prozaĵoj.
112 paĝoj, € 10,0.



Aleksander Korĵenkov.
Historio de Esperanto.
128 paĝoj, € 12,0.



L.L. Zamenhof
Mi estas homo.
288 paĝoj, € 24,0.



Aleksandr Duliĉenko.
En la serĉado de la mondlingvo.
160 paĝoj, € 15,0.